



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Aŭgusto 2016 n-ro: 8



Merhaba !

Artık yaz ortası diyebileceğimiz bir zamana geldik. Hava çok sıcak ama ortalığı sık sık da sular seller götürüyor. Bu durumun El Niño'nun etkisi olduğu söyleniyor.

Bu sayımızda sizin için çok sayıda ve çok farklı türden yazılar yayınlıyoruz. Başlangıç seviyesi ve orta sevidekiler kendileri için yazılar bulabilir dergimizde. Lütfen okuyun dilinizi geliştirin. Ayrıca bize düşüncelerinizi de yazın yayımlayalım.

Ay sonunda kısmetse beş kişi Slovakya Nitra'da gerçekleşecek 101. UK'da olacağız. Sonraki sayımızda sizlere Kongre'den haberler ve fotoğraflar aktaracağız.

İyi okumalar...

Saluton !

Ni jam atingis la tempon kiun ni povas nomi mez-somero. La veter esta tre varma, tamen ofte pluegas kaj oni diras, ke tiu fenomeno estas la efekto de El Niño.

En ĉi tiu numero ni publikigas multajn kaj diversajn verkaĵojn. Ambaŭ komencantoj kaj progresantoj povas trovi legaĵojn en nia revueto. Bonvolu legi ilin kaj plibonig vian lingvon. Sendu viajn opiniojn al ni.

En la fino de julio, se tio eblas, kvin Esperantistoj el Turkujo estos en Nitra Slovakio por la 101-a UK. En la venonta numero vi rakontos pi kaj publikigos fotojn de la Kongreso.

Bonan legadon al vi...



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo


Saluton	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Koncerto en Nitro	2
Esperanto Sumoo	3
UEA novaĵoj	3
TEJO novaĵoj	3
10-a Mezorienta Kunveno	4
Renkonto de Esperantistoj en la Paraiba-Valo	4
Heroldo estas aĉetita	5
Literojn ni ricevis	6
Portreto - Baldur Ragnarsson	6
Kiel tio komenciĝis	7
Tri poemoj de Rumi	10
Koncerto en Nitro	11
Viktimoj en la insularo Marŝalo	12
101-a UK 2016 - Ĉefa Programo	13
la plej granda trezoro (facila)	14
Tereza Kapista (1930-2016)	15
Kuiru kun mi - Ĉokoladsalamo	16
Dao De Jing kaj Laozi	16
Ŝercoj	18
Krucvort-enigmo	19
Poemo	20
La Junaj Detektivoj (ĉapitro3)	20
Brita ekŝiĝo el EU ne helpas Esperanton	22
Mallonga Historio de Filozofio(8)	23
UEA-MOnda Tago de Rifuĝintoj	24
Esperanto Kurso-8	25
Mondo-mapo pri esperantistoj	26
45-a Internacia Infana-junula Kongreseto - temo «Bestoj»	26
Internacia Simpozio Denove en Vroclavo	27
Fermo	28
Internacia Junulara Renkontiĝo de Esperanto en Islamabado, Pakistano	28

Kursoj



Kursoj estas en paŭzo dum la somero do ni atendas la monaton oktombro kiam ĉiu revenos el la someraj domoj kaj ferioj.

Koncerto en Nitro



Saluton,
Mi partoprenos la 101-an UK-on en Nitra. Mi donos koncerton dum la Ĉina Tago. Mi kunlaboros kun la skipo de Verda Stacio.
Amike,
Anjo Amika

*Kongresurbo Nitro
Slovakio*



Ni atendas leterojn de geamikojn



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

Esperanto-Sumoo



La Julia sumoo okazis inter la 3-a kaj la 10-a de julio nur por 8 tagojn ĉar en julio estas multaj esperantaj aranĝoj, renkontiĝoj, kunvenoj kaj ĉefe la UK Kongreso.

En ĉi tiu Esperanto-Sumoo partoprenis ĉirkaŭ 239 homoj el 28 landoj kaj 199 (83%) el ili venkis.

La kvanto de legitaj paĝoj estis ĉirkaŭ 7 000 kaj averaĝe unu homo legis 29 paĝojn dum la 8 tagoj de la Sumoo.

Plue reĉenzoj pri 14 libroj venis kaj oni povas legi ilin en la retejo de la Sumoo kies ligilo estas sube.

Bedaŭrinde, ke ĉi foje nur du luktistoj el Turkujo partoprenis la Sumoon, kaj la rango de Turkujo en la listo estis 22 :

- Vasil Kadifeli el Istanbul
- Mehmet Fatih Yüce el Adano

La retejo de Sumoo:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Sumoo grupo en facebook-o:

<https://www.facebook.com/profile.php?id=759066970888217>

UEA



**Biblioteka Apogo
Bachrich atendas
subvencipetojn**

N-ro 618 (2016-06-14)

UEA disdonos por la tria fojo subvenciojn el la Biblioteka Apogo Maria kaj Johano Bachrich por helpi pliriĝigi kolektojn de Esperanto-bibliotekoj. La komenca kapitalo (USD 20 000) de tiu speciala fondaĵo estis donacita de la gefiloj de gesinjoroj Bachrich en la jaro 2014. La venezuela esperantisto Johano Bachrich (1921-2005) estis Honora Membro de UEA kaj longtempa motoro de Venezuela Esperanto-Asocio. Ankaŭ lia edzino Maria (1936-2011) estis esperantisto.

Biblioteka Apogo Bachrich povas subteni Esperanto-bibliotekojn, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia nemovada instanco. La subvencioj estas uzablaj por akiri librojn aŭ aliajn varojn, kiuj estas aĉetablaj ĉe la Libroservo de UEA. En 2015 la fondaĵo subtenis ok bibliotekojn por la suma valoro de 1500 eŭroj.

Por peti subvencion, oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de dezirataj libroj aŭ aliaj varoj, ordigitaj laŭ prefero. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 30-a de aŭgusto 2016 paperpoŝte (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ retroŝte

Fonto:

<http://uea.org/aktuale/komunikoj/2016>

TEJO



**Anonco: nova
komisiito pri
UNESKO kaj
UNITED**

2016-06-27

Kun granda ĝojo ni jam povas anonci ke ni havas novan komisiiton pri UNESCO (Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo Organizo) kaj UNITED (por interkultura agado kontraŭ naciismo, rasismo, faŝismo kaj subteno de migrantoj aŭ rifuĝintoj) temas pri Klára Ertl, jen sia biografio por ke vi pli bonu konu ŝin!

<http://tejo.org/2016/06/anonco-nova-komisiito-pri-unesko-kaj-united/>

**Anonco: nova komisiito pri
Scienca kaj Faka Agado**

2016-06-22

Kun granda ĝojo ni jam povas anonci ke ni havas novan komisiiton pri SFA, temas pri Ana Ribeiro, jen sia biografio por ke vi pli bonu konu ŝin!

<http://tejo.org/2016/06/anonco-nova-komisiito-pri-sciencia-kaj-faka-agado/>

**Anonco: nova komisiito pri
Landa Agado en Azio**

2016-06-13

Kun granda ĝojo ni jam povas anonci ke ni havas novan komisiiton pri Landa Agado en Azio, temas pri Venki, jen sia biografio por ke vi pli bonu konu lin!

<http://tejo.org/2016/06/anonco-nova-komisiito-landa-agado-en-azio/>

10-a Mezorianta Esperanto-Kunveno kaj 1-a Kaŭkaza Esperanto-Kunveno



10-a Mezorianta Esperanto-Kunveno
kaj
1-a Kaŭkaza Esperanto-Kunveno
Renkontiĝo de esperantistoj el kaŭkazaj kaj mezorientaj
landoj en Kartvelujo en la jaro 2017-a.



Loko : Tbiliso.

Datoj : de la 31-a ĝis la 3-a de aprilo 2017, kun postaj
ekskursoj dum la semajno, unu el kiuj en
Armenujo.

Programo : prelegoj, ekskursoj, artaj aranĝoj!

Aliĝoj kaj informoj ĉe:

mezorianta.kunveno@esperanto.org

aŭ ĉe:

http://uea.org/vikio/La_deka_Mezorienta_Kunveno_en_Kartvelujo



Brazilo - Renkonto de Esperantistoj en la Paraíba-Valo

La 5-an de junio 2016 okazis en la urbo Lorena, ŝtato San-Paŭlo, Brazilo, unu plia Renkonto de Esperantistoj en la Paraíba-Valo. Ĝi estas tradicia evento, kiu okazas de jardekoj, alterne en urboj de la ŝtatoj Rio kaj San-Paŭlo.

Ĉi-foje, 40 gesamideanoj el 9 urboj entuziasme kunsidis de la 9-a ĝis la 17-a horo. D-ro João Santos (Rio) prelegis pri "Spertoj el la vivo de Esperantisto". Sekve, Alfredo Aragón (Rio) lanchis la libron "Vintra Rikolto", de Floriano Pessoa. La prezidantoj de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro (Márcio Santos), de Kultura Kooperativo de Esperantistoj (Givanildo Costa) kaj Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (Genildo Coelho) diskutis kun la publiko pri la temo "Kio mankas en nia regiona Esperanto-Movado?". Posttagmeze, oni atentis pri "Guto da Gramatiko". Sekve, Alexandre Prado prezentis kaj komentis du filmetojn en Esperanto. José Roberto Tenório prezentis tre interesan kvizon pri la Esperanta kulturo. Finiĝis la programo per informoj pri la proksimaj Esperanto-eventoj en la regiono.

La Renkonto okazis en komforta ĉambro en la sidejo de UNISAL, loka universitato. Oni proponis libroservon kaj lunĉojn, matene kaj posttagmeze. Tri radiostacioj informis pri la evento.

Paŭlo Sergio Viana



HEROLDO ESTAS AĈETITA – ĜI RENASKIĜOS EN 2017

"Heroldo de Esperanto" estas unu el la plej malnovaj Esperanto-gazetoj. Dum la lastaj jaroj ĉe la nuna eldonanto ĝi ofte malfruis, havis multajn problemojn – sed nun aperis espero pri ĝia revigliĝo.

Fabricio Valle (la antaŭa redaktoro de la revuo Esperanto) kaj Paulo Lima, partneroj en la entrepreno "Sociala Grupo Lexus" en Brazilio, aĉetis la gazeton "Heroldo de Esperanto" kaj eldonos ĝin ekde la jarkolekto 2017.

La ĝisnuna eldonanto Kooperativo de Literatura Foiro (membro de la pakto de G. Silfer) respondecas ankoraŭ pri la tuta jarkolekto 2016. La vendo ne koncernas la rajtojn pri la libroj: la rajtoj restas ĉe LF-koop kaj IIC.

Informoj pri la planoj de Lexus rilate la gazeton, fonditan de Teo Jung, aperos regule ĉe la Facebook-paĝo de la nova eldonanto: <https://www.facebook.com/lexussociala/>

L.S.

Fonto: Ret-Info, LS



La entrepreno Sociala Grupo Lexus havas multe da projektoj sed unu el ili bezonas grandan kaj tujan apogon de la esperantistaro: la regula aperigo de la gazeto Heroldo de Esperanto, ekde la jarkolekto 2017. Tra la jaro 2016 ni anoncos aliajn projektojn sed nun mi parolu nur pri Heroldo. Ni bezonas jenajn kunlaborantojn ĉefe sur la kampo de redaktado: baldaŭ ni anoncos detale kiel oni povos kunlabori kun Heroldo kiel korespondantoj, reporteroj, kunredaktoroj, provlegantoj, kolumnistoj/rubrikistoj, perantoj (oni perlaboros iom da mono!) ktp.

Fakto estas, ke ni bezonos ankaŭ profesiajn salajratajn redaktoron, redakcian sekretarion kaj ĉefan provleganton, kiu principe bezonos labori en Brazilio, en la sidejo de Lexus, sed pri tio nur estonte ni anoncos la kondiĉojn.

Se iuj el vi kredas, ke en unu el la volontulaj laboroj vi povos kunlabori, sin anoncu jam tuj, kaj baldaŭ ni sendos pli da informoj (ni devas prepari nin kaj nian skipon ĝis oktobro 2016).

Gravas diri, ke laŭ la prospero de Lexus, iom post iom ni profesiigos la ĉefajn postenojn, kiuj bezonas konstantan flegadon. Nia celo estas, ke nur hazardaj kaj ne-regulaj kunlaborantoj estu volontuloj.

<http://www.liberafolio.org/2016/valle-esperas-sesobligheroldon-de-esperanto>

Se vi ankoraŭ ne ŝatis nian paĝon, bonvolu ŝati:

<https://www.facebook.com/lexussociala/>



Fabricio Valle



Leterojn ni ricevis el geamikoj



picbadges.com/542088

Mi rigardas la novaĵojn kun profunda ĉagreno kaj solidare estas ĉe vi. Estu ni, la esperantistoj, konstruantoj de paco kaj ne de militoj. Ni daŭrigu nian agadon en la Meza Oriento, kvankam ni estas

formiko kaj tiuj, kiuj planas militojn, estas elefantoj. Vi daŭrigu vian sukcesan poresperantan agadon.

Amike

Renato Corsetti - Italujo/Britujo

Komisiono MONA de UEA



Karaj samideanoj en Turkio. Elkorajn kondolencojn al ĉiuj, kiuj suferas pro la abomena atako terorisma.

Betty Chatterjee - Danujo




Saluton el Francio. Mi esperas ke vi ĉiuj bonfartas, krom tiu bedaŭrinda atenco !

Lise Golomb - Francio



Saluton samideanoj! mi bedaŭras scii ke teroristoj agadis en la flughaveno de Istanbul..espereble ke baldaŭ la situacio denove trankviliĝos..restu sekura!

Mi Nomiĝas Ilia - Indonezio



Geamikoj el TURKIO, ricevu mian mensan subtenon; el korajn salutojn kaj esperon al vi kaj geamikoj. Ve! paco estas malproksima ; ni esperantistoj

daŭre klopodos por ĝi. Tutkore

Jocelyne Monneret - FRANCIO



Karegaj amikoj

Ekde hieraŭ mi estas ege malĝoja pro la perdo de la valoregaj homaj vivoj en via lando Turkio ĉe la Instanbula flughaveno. Ni ĉiuj samideanoj el Pakistano kaj

Nepalo elkore kondolencas al vi. Dio donu pacon kaj altajn rangojn al la animoj de senkulpaj mortitoj.

Frate via

Mian Salam SHANY

- Internacia Ĵurnalisto / Volontula EO Instruisto

Portreto - Baldur Ragnarsson



RAGNARSSON,

Baldur. 1930.

Islandano; instruisto, lerneja ĉefinspektoro.

Ano de Verkista Asocio de Islando. Verkis islandlingve poemlibrojn kaj fakajn librojn pri la islanda lingvo. Lernis Esperanton kiel

gimnaziano en 1949. Aktivis movade (lande kaj internacie) ekde 1952. Prezidanto de Islanda Esperanto-Asocio dum multaj jaroj. Prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA 1975-85. Akademiano ekde 1979. Estrarano de UEA pri kulturo kaj eduko 1980-86. Vicprezidanto de UEA 1980-83. LKK-prezidanto de la Rejkjavika UK (1977). Redakciano de Norda Prismo 1958-1974. "Arĝenta sprono de KOKO" pro originala verkado 1964.

Verkoj en Esperanto:

Originalaj:

Ŝtupoj sen nomo. (Originala poemaro). Stafeto, La Laguna 1959.

Esploroj. (Originala poemaro). Stafeto, La Laguna

1974.

La Sagaoj kaj Zamenhof: stabiligaj faktoroj.(Prelego kun sonbendo). Nagoya Esperanto-Centro, Nagoya 1982.

La Poezia Arto. (Kvin prelegoj faritaj en la kadro de la 26-a Kultura Semajnfino de SEL). Artur E. Iltis, Saarbrücken 1988.

La lingvo serena. Plena originala verkaro, Edistudio, Pisa 2007.

La neceso akceptebla. Poemaro, Mondial, New York 2008.

La fontoj nevideblaj. Poemaro, Mondial, New York 2010.

Laŭ neplanitaj padoj . Poemaro, Mondial, New York 2013.

Momentoj kaj meditoj. Poemaro, Mondial, New York 2016.

Tradukoj el la islanda:

Sub stelo rigida. (Traduko de du poemaroj sub unu titolo de la islanda poeto Þorsteinn frá Hamri). 131 p. Stafeto, La Laguna 1963.

Islandaj pravoĉoj. (Traduko de tri rakontoj kaj unu poemo el la antikva islanda literaturo). 110 p. Eldona Societo Esperanto, Malmö 1964.

Sagao de Njal. (Traduko de la plej granda el la antikvaj islandaj sagaoj). 357 p. Flandra Esperanto-Ligo,

Antverpeno 2003.
Sendependaj homoj (romano de Halldór Laxness).
Mondial, New York 2007.
Edda de Snorri Sturluson. Mondial, New York 2008.
Vundeblo loko (tri poemaroj de Gerður Kristný). 2009.
Sagao de Egil (Traduko de la sagao de Egil
Skallagrímsson, poeto kaj vikingo). Mondial, New York
2011.
Sagao de la Volsungoj kaj ĝiaj fontoj. Mondial, New
York 2011.

Ĉefaj eseoj:

"Studado de alia lingvo". Metodiko en la praktiko.
Esperanto-Centro Paderborn / Hungara Esperanto-
Asocio, Budapeŝto. 1982
"La proza poemo: la ĝenro, ĝiaj latentoj kaj aplikoj".
100-jara Esperanto. Fonto, Chapecó-SC (Brazilo).
1987.
"Cent jaroj de poezio en Esperanto". Memorlibro pri la
internacia jubilea Esperanto-konferenco. Cent jaroj de
Esperanto-kulturo. Eldonejo Perspektivo, Rødovre,
Danio. 1989.
"Tradukante la antikvan islandan literaturon en
Esperanto". Menade bal pūki bal. Festlibro por
Reinhard Haupenthal. Edition Iltis, Saarbrücken. 1998.
"La poezio de la skaldoj." Festlibro por André Albault.
Edition Iltis.
"La fono kaj la fronto: kelkaj konsideroj pri semiotikaj
aspektoj de la Esperanta poezio." Lingva arto, jubileta
libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton,
Universala Espeanto-Asocio, Rotterdam, 1999.
La poemoj de Armand Su. Ĉefartikola recenzo. Iltis-
Forumo, N-ro- 2, 1993.
Kombino de poeta virtuozecko kaj ties instrumento.
Ĉefartikolo pri Poemo de Utnoa de Abel Montagut.
Iltis-Forumo, Nro 2, 1994.
Historio de la Movado de Esperanto en 12 artikoloj.

(Parto de la kurso RITE ĉe edukado.net)
Nia kultura heredaĵo el la historio de la Esperanta
literaturo. Aperis en Juna amiko 1999 - 2015. El 42
eroj 20 aperis ankaŭ en Libera Folio 2005-2007.

Verkoj en la islanda lingvo:

Poemaroj:

Undir veggjum veðra. 1962.
Töf. 1970.

Faklibroj:

Mál og málnotkun (Lingvo kaj lingvuzo). 1965.
Skólaritgerðir (Gvidlibro pri verkado de eseoj). 1967.
Íslenzk hljóðfræði (Islanda fonetiko). 1969.
Mál og ritleikni I, II (Lingvo kaj verkada kompentento).
1971 - 72.
Mál og leikur (Lingvo kaj dramatikio). 1973.
Móðurmál (Gepatra lingvo, gvidlibro por instruistoj).
1977.
Ljóðlist (La arto de poezio). 1983.
Stílfraði (Stilistiko). 1985.
Ný kennslubók í esperanto (Nova lernolibro de
Esperanto). 1987.
Mál og málsaga (Lingvo kaj lingvohistorio). 1992.
Esperanto - alþjóðlegt samskiptamál (Esperanto -
internacia komuniklingvo). 2004.
Setningafræði (Sintakso). 2004.

Krome dekoj da tradukoj en diversaj revuoj,
lastatempe ĉefe en la revuo La tradukisto.

Fonto:

<http://esperanto.net/literaturo/autor/ragnarsson.html>

Kiel tio komenciĝis

Mian knabaĝon mi pasigis en vilaĝo ĉe unu el la multaj
fjordo, kiuj tranĉas la bordojn de Orienta Islando.
Ambaŭflanke de tiu fjordo altaj montoj levas siajn
pintojn al la ĉielo. La fjordo mem estas profunda kaj
riĉa je fiŝoj. La infanoj vivis libere, aŭ grimpane sur la
deklivoj de la montoj aŭ hokante fiŝetojn de sur la
multaj lignaj varfoj dise starantaj laŭlonge de la vilaĝa
bordo. Ili ankaŭ frue partoprenis la laborojn de la
plenkreskuloj, precipe dum la somero. Dum la vintro ili
kompreneble devis ĉeesti la lernejon, la solan en la
vilaĝo.

En tiu lernejo instruis mia patro. Kaj ĉar li estis homo
edukita li devis ankaŭ okupi sin pri diversaj aliaj aferoj

verkis: Baldur Ragnarsson

de kulturo. Li prizorgis la komunan bibliotekon, aranĝis
teatraĵojn, faris paroladojn je solenaĵoj. Li edukiĝis en
la Pedagogia Lernejo en la ĉefurbo Rejkjaviko. Unu el
liaj kunstudantoj tie estis fervora esperantisto. Li havis
la kutimon saluti la kunulojn matene en Esperanto:
"Bonan tagon!". Tion diris al mi mia patro. Dudek jarojn
poste mi havis la okazon paroli kun tiu homo, tiam
estro de duagrada lernejo. Li ne forgesis sian
Esperanton, sed estis tro okupita por partopreni
aktivadon por la lingvo. Mi diris al li mian ekkoniĝon
kun Esperanto pere de lia siatempa "Bonan tagon"-
saluto. Tio lin amuzis kaj ĝojigis.

En mia hejma vilaĝo estis ŝuisto, kiu tenis malgrandan

librovendejon en ĉambro apud sia laborejo. Tie inter popularaj romanoj, biografiaj libroj kaj tradiciaj poemaroj mi trovis lernolibron de Esperanto. Ĝi enhavis mallongan gramatikon en la islanda lingvo sen ekzercoj, kaj legmaterialon. Mi aĉetis tiun libron pro scivolemo kaj eble kun iom neklara intenco ĝin iam trastudi. Tiam mi havis 14 jarojn. Sekvis du jaroj en duagrada lernejo. La tempo por Esperanto ankoraŭ ne venis.

Kaj jen mi trovis min en Akureyri, urbo en Norda Islando. Unuajara gimnaziano. Iun tagon mi rimarkis en montrofenestro de librovendejo libron kies titolo tuj frapis min rememorige pri mia knabaĝa intereso. Mi eniris kaj petis permeson rigardi la libron. Mi tuj konstatis, ke mi tenis ion eksterordinaran en la mano: la unuan lernolibron de Esperanto en la islanda lingvo, eldonitan en 1909. Temis pri libro bazita sur la fama lernolibro de Théophile Cart, *L'espéranto en dix leçons – Esperanto en dek lecionoj* (1902). La islanda versio, farita de Thorsteinn Thorsteinsson, pioniro de Esperanto en Islando (1880-1979), estis iom pli ampleksa ol la originalo, havanta 12 lecionojn kaj sufiĉe detalan Esperantan-islandan vortaron. Kompreneble mi aĉetis la libron, neniel antaŭsentante, kiom multe ĝi influos mian vivon.

Dum la sekvanta somero mi laboris kiel ordinara vojlaboristo en certa valo en montara regiono en Orienta Islando. Ni estis kune dudek homoj kaj loĝis en tendoj. Mi kunportis mian lernolibron de Esperanto kaj komencis ĝin studi en la vesperoj post la taglaboro. Mia kurentendano estis homo, tridek jarojn pli aĝa ol mi, bonkorulo, kiu tre respektis mian "edukitecon", preparis nian kafon kaj plenumis ĉiujn farendadojn de nia komuna tendara vivo, iusence mi povas danki al li la senzorgan cirkonstancon de mia Esperanto-lernado. Preskaŭ tuj mi estis tiom kaptita de la lingvo, ke mi uzis duonon de la tagmeza manĝopaŭzo por lernado, mi ankaŭ kunportis la libron en mia poŝo al la laboro kaj legis kelkajn frazojn en paŭzoj, kiuj ofte doniĝis. Kiel supozeble tia dinamika metodo, motivita kaj motorita de entuziasmo pri la lingvo mem, nepre donas rapidajn rezultojn: en la aŭtuno post kelksemajna studo mi jam komencis korespondi kun eksterlanda esperantisto, svisa poŝtisto, kies nomon mi hazarde trovis. Kaj ne nur tio. Ege grava por mi estis preskaŭ tuja kontakto kun la frua periodo de la lingvo. Tiel estis, ke mia antaŭa instruisto en la duagrada lernejo, informita de mia patro pri miaj Esperanto-studoj, sendis al mi kelkajn librojn el la postlasitaj posedaĵoj de bona laboristo,

kiuj ĵus mortis. Tiu homo estis unu el la plej fruaj esperantistoj en Islando kaj abonis revuojn kaj mendis librojn el eksterlando. Inter tiuj estis binditaj jarkolektoj de la revuoj "Lingvo internacia" kaj "Juna esperantisto", la poemaro "El parnaso de popoloj" de Grabowski kaj "Estu homo!", traduko el la franca de Samuel Meyer. Pri tiu laste menciita mi havas belan memoradon. Kutime ni, la vojlaboristoj, veturis sabate hejmen kaj reiris al la envala tendaro dimanĉe vespere. Ni veturis per ŝarĝaŭtomobilo, sidantaj sur sendorsaj benkoj en ŝirmejo fiksita sur la platplanko de la aŭto. Estis libera loko malantaŭ la ŝirmejo kaj tie ni, la junuloj, ofte sidis por amuzo sur la plankfino. Tiel okazis, ke dum la aŭto transveturis malgrandan, senpontan rivereton mi, sidanta sur tiu riska loko, tiam legante laŭte la libron "Estu homo!", subite ĝin perdis el la mano en la rivereton. Mi tuj kriis al la ŝoforo, ke li haltigu la aŭton, kion li faris, ektimante ke okazis akcidento. Feliĉe ne estis tiel, mi ensaltis la rivereton kaj elsavis la libron, nur iomete malsekan. Ankoraŭ hodiaŭ mi konservas tiun libron, ĝi montras ankoraŭ frontpaĝe la signon pri tiu aventuro.

Ĉiuj tiuj libroj devenas el la jaroj 1912 – 1913. Jen do legmaterialo, kiu kvazaŭ eksplode vastigis mian horizonton kaj maturige influis mian sintenon al la lingvo kaj ĝia kulturo.

Fininte la gimazion mi transloĝiĝis al la ĉefurbo Rejkaviko por studi en universitato. Jam tiam mi fianĉiĝis al mia samklasanino Þórey, kiu ankaŭ lernis Esperanton. Ankaŭ ŝia patro estis elstara esperantisto. Kiam mi vizitis unuafoje la hejmon de miaj estontaj bogepatroj – tiam ankoraŭ gimnaziano – la patro de mia fianĉino, pastro Halldór Kolbeins, alparolis min en Esperanto, kaj nur post duonhoron li ŝanĝis al la islanda. Ankaŭ nia filo Ragnar flue parolas Esperanton. Do ni havas ĉi tie tri generaciojn de esperantistoj.

Veninte al la ĉefurbo mi tuj aliĝis al la Esperanto-societo tie, al kiu mi apartenis ĉiam poste. Mi baldaŭ komencis verki en la lingvo, unue poemojn. Mi havas longan verkistan karieron ankaŭ en la islanda lingvo, sed mia Esperanta verkisteco estas al mi pli kara.

Mia sperto de lernado de Esperanto estas simple la jena: Nenio povas anstataŭi intereson, jes entuziasmon, en lernado de lingvo. Mi ne havis instruiston, mi lernis la lingvon en izoleco, per lernolibro malgranda, gramatike kaj literature orientita, malnaiva, fidanta al plena sindediĉo de la lernanto. Kaj

mi emas kredi, ke ĝuste tia lernolibro estas la plej taŭga por subteni la intereson per sinsekve rapidaj kaj senhalte pliaj postuloj ĝis la klare antaŭvidebla fino. Tia estis la lernolibro de T. Cart kaj tion atestis la multaj tradukoj de ĝi en aliajn lingvojn, i.a. la islandan. Kaj feliĉe estis tia libro, kiu trafis en miajn junulajn manojn

antaŭ pli ol kvindek jaroj.

(Komencanto, 5, 2005)

Fonto: <http://www.akademio-literatura.org/nobel-kandidato/eseoj/kiel-tio-komencighis>

Vortareto					
		iusence	bir anlamda	postlasita	geriya bırakılmış
		izoleco	izolasyon	postulo	talep
akcidento	kaza	jarkolekto	yıllık koleksyon	prizorgi	ilgilenmek,
alparoli	hitap etmek	jena	işte yandaki		sorumluluğu almak
ampleksa	geniş, kapsamlı	ĵus	henüz, hemen şimdi	profunda	derinlemesine olan
anstataŭi	yerini almak	kaptita	yakalanmış	rememorige	hatıratarak
antaŭsentante	önceden hissederek	kara	değerli	revuo	dergi
antaŭvidebla	önceden görülebilen	kelksemaĵna	bir kaç haftalık	samklasano	aynı sıftan olan
atesti	tanıklık etmek	klare	net olarak	ŝarĝaŭtomobilo	yük otomobili
benko	bank	konservi	saklamak	scivolemo	merak
bieria laboristo	bira işçisi	korespondi	yazışmak	sendorsa	arkalıksız
bindita	ciltlenmiş	kredi	inanmak	senponta	köprüsüz
bogepatroj	kayınpeder+valide	kunstudanto	birlikte öğrenen	senzorga	endişesiz
cirkonstanco	durum		öğrenci	sindediĉo	kendini adamışlık
deklivo	eğim, dik yer	kuntentado	aynı çadırda kalan	sinsekve	peşisıra gelen
deveni	gelmek		kişi	sinteno	davranış
dise	ayrılmış	kutimo	gelenek	ŝirmejo	korunaklı yer
doniĝi	verilmek	kvazaŭ	sanki	societo	topluluk, kulüp,
duagrada	ikinci seviye	laŭte	yüksek sesle		dernek
edukiĝi	eğitilmek	levi	kaldırmak	solenaĵo	yalnızlık
ekkoniĝo	tanımaya başlama	ligna	aħşaptan	sperto	deneyim
eksplode	patlayarak	malnaiva	naif olmayan, ciddi	subteni	desteklemek
eksterlanda	ülke dışından olan	manĝopaŭzo	yemek molası	supozeble	iddiaya göre
eksterordinara	olaĝandışı	maturige	olgunlaştırarak	taglaboro	günlük iş
ektimante	korkarak	memoraĵo	hatırat	trafi	hedeflemek
elsavi	bir şeyden kurtarmak	menciita	bahsedilen	transloĝiĝi	taşınmak
emi	meyilli olmak	mendi	sipariş etmek	transveturi	karşıya geçmek
entuziazmo	heyecan	montrofenestro	vitrin	tuja	hemen oluşan
envala	vadi içinde olan	neniel	hiçbir şekilde	varfo	iskele (sandal)
farendaĵo	yapılması gereken	nepre	zorunlu olarak	vastigi	genişlemek
	şey	okupi sin	kendini meşgul etmek	verkisteco	yazarlılık
fervora	azimli	orientita	yöneaylenmiş	vojlaboristo	yol işçisi
fianĉiĝi	nişanlanmak	pastro	papaz		
fidanta	güvenen	pinto	uç nokta		
frapi	çarpmak	pioniro	öncü		
grimante	tırmanarak	plankfino	döşeme sonu		
ĝuste	tam da o	platplanko	düz döşeme		
haltigi	durdurmak	plenkreskulo	yetişkin		
hazarde	şansa	plenumi	yerine getirmek		
hokante	kancaya geçirerek	plia	daha fazla		
horizonto	ufuk	posedaĵo	varlık		
influi	etkilemek	poŝtisto	postacı		

Tri poemoj de Rumi



En mia artikolo de la 1-a de decembro 2015 mi mallonge priskribis la vivon de la fama mistikulo kaj poeto Rumi. Hodiaŭ mi aldonas mian tradukon de du komentarioj trovitaj en la interreto pri Rumi kaj de

tri poemoj.

“Ĝalal-ed-din Mohammad, ankaŭ konata kiel Rumi, estis filozofo kaj islama mistikulo. Lia doktrino defendas senliman toleremon, pozitivan rezonadon, bonkorecon, karitaton kaj konscienccon per amo. Por li kaj liaj disĉiploj ĉiuj religioj estas pli-malpli veraj. Rigardante sammaniere islamanojn, judojn kaj kristanojn, lia paca kaj tolerema instruado tuŝis homojn el ĉiuj sektoj kaj kredoj. Tamen, malgraŭ la ĵus menciita ekumena sinteno, kaj kontraŭe al lia nuntempa okcidenta portreto kiel proponinto de nekonesia spiriteco, pluraj poemoj de Rumi sugestas la gravecon de eksteraj religiaj ritoj kaj la unuarangecon de la Korano.”

(<http://www.poemhunter.com/mewlana-jalaluddin-rumi/biography/>)

“Ĝalal-ed-din Rumi estas unu el la monde plej respektataj mistikaj poetoj. Dum sia vivdaŭro li produktis fekundan gamon de inspira kaj devoteca poezio, kiu resumas la sufian sperton de unio kun la dieco. Tiuj sentempaj klasikaĵoj ĝuis renaskiĝon dum la lastaj jaroj, kiam Rumi iĝis unu el niaj plej popularaj poetoj. Kvankam Rumi estis sufio kaj granda erudiciulo pri la Korano, lia allogo trapasas religiajn kaj sociajn dividojn. Eĉ dum lia vivdaŭro estis konata lia kosmopolita sinteno.” (<http://www.poetseers.org/the-poetseers/rumi/index.html>)

Rumi skribis en la persa, kun bela ritmo kaj ofte kun rimoj. Do malfacilas traduki tian poezion. La plej fama tradukinto al la angla estis A. J. Arberry. Ŝajne li tradukis – en la 1960-aj jaroj – sufiĉe laŭvorte. Alia

konata tradukinto, Coleman Barks, tradukis pli libere.

Mi ne scipovas la persan kaj mi ne estas poeto. Volante nur doni etan ideon

pri la poezio de Rumi, mi tradukis Esperanten tri poemojn (tradukitajn al la angla de Coleman Barks).

Iun Kison Ni Deziras

Ekzistas iu kiso, kiun ni deziras
per tuta nia vivo,
la tuŝon de la spirito sur la korpo.
Marakvo petegas la perlon
rompi sian ŝelon.
Kaj la lilio - kiel pasie
ĝi bezonas iun sovaĝan karulon!
Dumnokte mi malfermas la fenestron
kaj petas la lunon veni
kaj premi sian vizaĝon kontraŭ la mian,
spiri en min.
Fermu la pordon de la lingvo,
kaj malfermu la fenestron de l'amo.
La luno ne uzos la pordon,
nur la fenestron.

(El <http://peacefulrivers.homestead.com/rumilove.html>)


Kiu ajn alportis min ĉi tien

Pri tio mi pensas la tutan tagon,
kaj mi diras ĝin vespere.
De kie mi venis, kaj kion mi devas fari?
Mi tute ne scias.
Mia animo estas de aliloke,
mi certas pri tio,
kaj mi intencas finiĝi tie.

Tiu ĉi ebrico komenciĝis en iu alia taverno.
Kiam mi revenos al tiu loko,
Mi estos tute sobra.
Dume mi estas kvazaŭ birdo el alia kontinento,
sidanta en ĉi tiu birdejo.
Baldaŭ venos la tago, kiam mi flugos for,
sed kiu estas nun en mia orelo, aŭdanta mian voĉon?
Kiu diras vortojn per mia buŝo?

Kiu elrigardas per miaj okuloj? Kio estas la animo?
Demandi mi ne povas ĉesi.
Se mi povus gustumi unu trinketon de respondo,
Mi povus eskapi el tiu malliberejo por ebruloj.
Mi ne venis ĉi tien propravole,
kaj sammaniere mi ne povas foriri.
Kiu ajn alportis min ĉi tien devas konduki min hejmen.

Ĉi tiu poemo. Mi neniam scias, kion mi diros.



Mi ne planas tion.
Kiam mi estas ekster la dirado de tio,
Mi fariĝas tre trankvila
kaj malofte parolas.

(El <http://www.poetseers.org/the-poetseers/rumi/whoever-brought-me-here/index.html>)

Kiam mi mortos

Kiam mi mortos,
kiam mia ĉerko
estos portata for,
neniam pensu,
ke mi sentos la mankon
de ĉi tiu mondo.

Ne verŝu ajnan larmon,
ne lamentu nek kompatu.
Mi ne falos
en abismon de monstro.

Kiam vi vidos
mian forportatan kadavron,
ne ploru pro mia foriro.
Mi ne foriros,
mi alvenos al eterna amo.

Kiam vi lasos min
en la tombo,
ne adiaŭu.
Memoru, ke tombo estas
nur kurteno
por la malantaŭa paradizo.

Vi nur vidos min
malsupreniri en tombon.

Sed rigardu min leviĝi.
Kiel povas esti fino,
kiam la suno subiras
aŭ la luno malsupreniras?

Ĝi aspektas kvazaŭ la fino,
ĝi similas al sunsubiro,
sed en realo ĝi estas tagiĝo.
Kiam la tombo enfermas vin,
via animo estas liberigita.

Ĉu vi iam ajn vidis
semon falintan al tero
ne leviĝi kun nova vivo?
Kial vi dubas pri la leviĝo
de semo nomita homo?

Ĉu vi iam ajn vidis
sitelon malleviton en puton
reveni malplena?
Kial lamenti pri animo,
kiam ĝi povas reveni
kiel Jozefo de la puto?

Kiam lastfoje
vi fermos vian buŝon,
viaj vortoj kaj animo
apartenos al la mondo de
neniu loko, neniu tempo.

(El <http://www.poemhunter.com/poem/when-i-die-76/>)

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis Herbert A. Welker el Brazilo

<http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/2016/06/tri-poemoj-de-rumi.html?view=flipcard>

Koncerto en Nitro



Karaj, mi koncertos dum la UK en Nitro jam la 23-an de Julio 2016. Mia kantado okazos je sabato ekde la 17-a horo en salono "Hodler".

Mi tre ĝojus, revidi vin tie.
Ĝis baldaŭ.
Amike,
Ralph Glomp



La 31an de majo mi verkis artikolon pri la viktimoj pro la usonaj hidrogenbombaj eksperimentoj okazigitaj en la suda Pacifiko, kaj sendis ĝin al la mondo. Kelkaj homoj respondis, dirante, ke ili neniam havis informon pri tiuj eksperimentoj. Hodiaŭ mi tradukos artikolon en la ĵurnalo Akahata (organo de Japana Komunista Partio, la 8an de marto 2016) pri la viktimoj en la insularo Marŝalo (Marshall).

Tiuj insularoj konsistigas Respublikon de Insularo Marŝalo. Ĝia areo estas 180 km² kaj la loĝantaro estas 52 898 (en 2014). Jen estas ĝia historio:

- 1528: Hispanoj atingis la insularon.
- 1885: Germanio gajnis la insularon.
- 1914: La unua mondmilito komenciĝis, kaj Japanio okupis ĝin.
- 1920: Japanio komencis regi ĝin, konfidite de la Ligo de Nacioj.
- 1947: Usono komencis regi ĝin, konfidite de Unuiĝintaj Nacioj.
- 1986: sendependiĝis.
- 1991: membriĝis al Unuiĝintaj Nacioj.

Jen rakonto de Tony deBrum (1945 ~), eksa ministro pri eksterlandaj aferoj :



En 2014, Respubliko de la insularo Marŝal akuzis la ses landojn, kiuj posedas nukleajn armilojn, al ICJ (Internacia Kortumo de Justeco, International Court of Justice), petante, ke ili tuj komencu preparoli kaj sincere konsenti al nuligo de ĉiuj nukleaj armiloj el la

terglobo.

Nia lando, posedante armeon nek teran, nek maran, neniam donas al la aliaj landoj minacon. Ni ne intencas okazigi disputon al la grandaj landoj. Ni nur sincere petas ilian komprenon, surbaze de niaj spertoj pri la usonaj nukleaj eksperimentoj, ke nukleaj armiloj neniam kondukos nin al paca kaj harmonia mondo.

Ĉiuj nukleaj armiloj estas kontraŭ moralo kaj kontraŭ leĝo. Ili ne ekzistu inter la homaro, kiu havas civilizacion.

Kiam okazis nuklea eksperimento "Bravo", mi estis 9-jara. Mi fiŝkaptis kun mia avo en la atolo Likiep, 320 kilometrojn for de la eksperimentejo.

Komence aperis ekbrilego. Neniu impulso okazis. Mi tenis fiŝon kaptitan de la avo. Li faligis reton el siaj manoj kaj diris en la marŝala lingvo: "Denove, eksplodo!"

La ĉielo fariĝis ruĝega kiel sango. Kaj poste venis impulsego. Ankoraŭ ne aŭdiĝis sono. La sono estis kvazaŭ tondro. Sinsekve aŭdiĝis sono "uoon". Mi estis 9-jara, do mi ne memoras, kiom longe ĝi daŭris. Ŝajnis al mi, ĉio okazis momente.

Tiu bombo estis kelkmiloble pli forta ol tiu faligita sur Hiroŝimon. Estas neimageble, ke unu bombo havas tiom da potenco.

La eksperimento en la atolo Bikini suferigis ĉiujn; ĉu plenkreskuloj aŭ infanojn, ĉu viroj aŭ virinoj, ĉu homoj aŭ bestoj. Mi havis 24 amikojn en mia klaso tiutempe, sed ĉiuj jam mortis krom mi kaj unu el miaj amikoj. Ili mortis june. La hundon, kiun mi tenis, usonanoj rabis de mi por ekzameni influon de la radioaktiveco sur ĝin. Akvo kaj la tero estis poluitaj. Fiŝoj, kraboj kaj konkuloj, de kiuj dependas la loĝantoj, estis poluitaj.

Niaj insuloj fariĝis neloĝeblaj, eĉ post 12000 jaroj.. Infanoj kaj junuloj malsaniĝas. La damaĝoj aperadas trans la generacioj. La usonaj eksperimentoj difektas la koron kaj la korpon de la pluvivantoj, kaj eĉ la postaj generaciuloj devos suferadi pro tiuj vundoj el la nigra historio.

Ni kaj suferantoj de Hiroŝimo kaj Nagasaki havas samspecajn spertojn, maltrankvilojn kaj timojn pri la estonta vivo.

Ni povas prezenti ekzemplon jene:



Vi estas junulo el la atolo Kwajalein kaj amas junulinon el poluita insulo. Antaŭ ol vi proponos geedziĝon al ŝi, vi certe hezitos. Ĉu ne naskiĝos handikapa bebo? Ĉu ne okazos al la bebo malnormalaĵo pri geno? Se naskiĝos tia bebo, tiam vi sentos bedaŭron pri via geedziĝo.

Pri tiuj aferoj nenie estas statistiko, sed kiom da patrinoj nokte ploris? Kiom da patrinoj perdis esperon? La damaĝoj de la nukleaj eksperimentoj en Marŝalo estas tre realaj.

De elmetigo de radioaktiveco al homoj ĝis sistema kaŝado de gravaj influoj al sano, de korpaj eksperimentoj al la insulanoj ĝis tro frua revenigo de la loĝantoj al iliaj hejminsuloj, kaj de malakcepto de kompensa mono ĝis kaŝiĝo de fundamentaj informoj pri la damaĝoj. La nuklea historio de la insularo Marŝalo estas perforto, trompo kaj neado de homa digno al samaj homoj fare de homoj kun fortaj potenco kaj ambicio.

Tiuj, kiuj eksperimentis nukleajn bombojn, diradas: "Nenio gravas. Ne zorgu multe!" Tiuj estas malicaj vortoj ripetataj en la nuklea kampo.

Kiam okazis la akcidento en Fukuŝima, ni diris al miaj amikoj: "Certe okazos sama afero en Fukuŝima, kiu okazis en Bikini, Three Mile kaj Ĉernobil. Unue estos anonco: "Nenio gravas. Vi baldaŭ povos reveni hejmen". Ili diras, ke la akcidento baldaŭ estos regata kaj la radioaktivaĵoj estos tuj forviŝitaj... Mia tiu antaŭsupozo vere efektiviĝis. Tio estas mirinda. Historie ĉiam sekretoj akompanas nukleajn utiligojn ĉu militaj aŭ pacaj. En IAEA (Internacia Atomenergia Organizo, International Atomic Energy Agency) samaj homoj traktas kaj nukleajn armilojn kaj nukleajn centralojn. Ĝi estas societo konsistanta el homoj kun samaj opinioj. Tial ili diras, ke nukleaj reaktoroj estas sekuraj, kvankam mankas sekurigaj sistemoj al tiuj. Ambaŭ nukleaj armiloj kaj nukleaj centraloj estas frenezaj. Ambaŭ estu forĵetitaj.

Antaŭ la Bikini-Tago, la 1an de marto, okazis kantoj, dancoj kaj filmprezentadoj por ke homoj ne forgesu la damaĝojn de la nukleaj eksperimentoj. La 1an de marto gelernantoj prelegis en lernejoj. Mia 7-jara nepino parolis, reprezentante la gelernantojn de la 3a lernjaro. Estas grave, ke junuloj lernu la faktojn kaj heredu la plej altan moralon, ke la mondo estu libera de nukleajĵoj. Ĉirkaŭ la minaco al la vivo kaj feliĉo naskiĝas tute novspecaj homoj.

101-a UK 2016 - Ĉefa Programo

Ĉi tie aperas nur la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.

Sabato, 23 julio Malfermo de la kongresejo je 9:00. Alveno de la kongresanoj kaj registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj. Libroservo. Movada Foiro/Interkona Vespero. Giĉetoj funkcias ĝis 18:00.

Dimanĉo, 24 julio Solena Inaŭguro (10:00). Libroservo. Inaŭguro de IKU/AIS. Kongresa Temo. Paroligaj Kursoj. Slovaka Eksprese. Ĉeĥa Eksprese. Nacia Vespero.

Lundo, 25 julio Libroservo. IKU-prelegoj. Paroligaj Kursoj. Kleriga Lundo. Slovaka Eksprese. Ĉeĥa Eksprese. Ekumena Diservo. Teatro. Bankedo. Kongresa Balo.

Mardo, 26 julio Libroservo. Paroligaj Kursoj. Tago de Lernado. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Estraro respondas. Slovaka Eksprese. Ĉeĥa Eksprese. Landa Agado. Delegita Reto. Societo Zamenhof. Teatro.

Merkredo, 27 julio Tuttagaj ekskursoj.


Ĵaŭdo, 28 julio Libroservo. Libro de la Jaro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Belartaj Konkursoj. Paroligaj Kursoj. Centra Oficejo respondas. Urba Akcepto (por invititoj). Koncerto.

Vendredo, 29 julio Libroservo. Komitato de UEA. IKU-prelegoj. Paroligaj Kursoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Venontaj UK-oj. IAV.

Fonto: <http://www.nitra2016.sk/cxefa-programo/>



La plej granda trezoro (de Amit Garg)



Iun tagon Petro trovis trezormapon.
 "Bonege! Mi serĉos tiun trezoron kaj spertos aventuron!" li elkriis.
 Petro ekis.
 Li piediris dum longa tempo kaj finfine atingis arbaron.
 Tie li ekvidis leonon.
 "Vi estas forta kaj kuraĝa", diris Petro al Leono.
 "Ĉu vi bonvolus veni kun mi por trovi trezoron?"
 Leono akceptis kaj sekvis Petron.
 La arbaro estis densa kaj malhela.
 Petro timis, sed dank'al Leono li sukcesis trairi ĝin.
 Kiam la du finfine atingis montaron ili ekvidis Aglon.
 "Via vidkapablo estas bonega kaj vi povos averti nin pri danĝeroj", diris Petro al Aglo.
 "Ĉu vi bonvolus veni kun ni? Ni serĉas trezoron".
 Aglo akceptis kaj sekvis Petron kaj Leonon.
 La montoj estis altaj kaj krutaj.
 Leono stumblis, sed Petro rapide helpis kaj suprentiris lin.
 Aglo per sia bona vidkapablo atentis pri ĉiuj iliaj paŝoj.
 Iom poste ili atingis valon kie ili ekvidis Ŝafon.
 "Ĉu vi bonvolus veni kun ni por serĉi trezoron", Petro demandis al Ŝafo "kaj varmigi nin kiam malvarmas?"
 Ŝafo akceptis kaj sekvis Petron, Leonon kaj Aglon.
 Malvarmega vento blovis tra la senfina herbejo.
 Ili ĉiuj alproksimiĝis al Ŝafo dank'al kiu ili restis varmaj

kaj komfortaj.
 La kvar finfine atingis dezerton kie ili ekvidis Kamelon.
 "Oni nomas vin ŝipo de dezerto", diris Petro al Kamelo.
 "Ĉu vi bonvolus helpi nin transiri la dezerton kaj veni kun ni por trovi trezoron?"
 Kamelo akceptis.
 Petro, Leono kaj Ŝafo surgrimpis Kamelon kaj gaje rajdis tra la vasta dezerto dum Aglo ĝuis la pejzaĝon de supre.
 Kamelo ekgalopis kaj ĉiuj kriis entuziasme.
 Trairi dezerton sur dorso de Kamelo estis elstara sperto.
 La kvin finfine atingis maron kie ili ekvidis Testudon.
 "Ĉu vi bonvolus helpi nin transiri la akvon?" demandis Petro al Testudo.
 "Ni serĉas trezoron".
 Testudo akceptis kaj sekvis Petron, Leonon, Aglon, Ŝafon kaj Kamelon.
 La fortaj ondoj preskaŭ dronigis la grupon, sed Testudo lerte kondukis ilin al la tero.
 Tie ili ekvidis Strigon.
 Strigo alparolis ilin kun granda saĝeco.
 "Gratulojn, vi trovis la trezoron."
 "Kie ĝi estas?"
 Ili ĉiuj demandis kun surprizo.
 "Kune vi transiris la arbaron, grimpis sur monton, kuraĝis trans la herbejon, riskis tra la dezerto kaj atingis la alian flankon de la maro. Vi neniel povintus tion fari sen helpi unu la aliajn."
 Ili ĉiuj ĉirkaŭrigardis kaj komprenis ke Strigo pravas.
 Ili trovis amikecon!
 Sen iu ajn dubo tio estas la plej granda trezoro en la mondo.

Prenita de Bookbox

https://www.youtube.com/watch?v=172luzJwD_o

Vortareto

aglo	kartal	dorso	sirt	kiam	ne zaman ki
alproksimiĝi	...e yaklaŝmak	dronigi	boĝmak	kompreni	kavramak, anlamak
amikeco	arkadaŝlik	dubo	ŝüphe	konduki	götürmek
atenti	dikkat etmek	ekgalopi	dörtnala gitmek	kruta	dik
atingi	ulaŝmak	eki	yola çıkmak	kuraĝa	cesur
averti	ikaz etmek	elstara	önde gelen, önemli	leono	aslan
ĉirkaŭrigardi	etrafına bakmak	entuziasme	çoşkulu	lerte	becerikli şekilde
danĝero	tehlike	finfine	nihayet, en sonunda	malhela	loş, ışsız, karanlık
dank'al	..a şükürler olsun	gaje	neşeli	malvarmi	üşümek
de supre	yukarıdan	gratulojn	tebrikler	maro	deniz
densa	sık, yoğun	ĝui	zevk almak	mondo	dünya
dezerto	çöl	herbejo	otlak	montaro	dağ sırası
		kamelo	deve	neniel	hiç bir şekilde

ondo	dalga	sekvi	takip etmek	timi	korkmak
paŝo	adım	senfina	sonsuz	trairi	içinden geçip gitmek
pejzaĝo	pejzaj, manzara	sperti	deneyimlemek	transiri	karşıya geçmek
piediri	ayakla yürüme	sperto	deneyim	trezormapo	hazine haritası
povintus	yapabilirdi	strigo	baykuş	trezoro	hazine
pravi	haklı olmak	stumbli	tökezlemek	unu la alian	biri birini
preskaŭ	neredeys	suprentiri	yukarıya çekmek	valo	vadi
rajdi	binmek (ör. at)	surgrimpi	üzerine tırmanmak	vasta	engin
resti	kalmak	tero	toprak, kara	vidkapablo	görüş imkanı
ŝafo	koyun	testudo	kaplumbağa		

Tereza Kapista (1930-2016)



Tereza Kapista, prezidantino de Beograda Esperanto Societo mondkonata esperantistino hodiaŭ foriris en rememoro.

Ŝi estis esperantistino, instruistino de internacia lingvo Esperanto,

hungarino el Serbio, sed monda civitanino. Ŝi travojaĝis la "tutan mondon", multajn landojn sur kvin kontinentoj, instruante al homoj internacian lingvon Esperanto. Profesie ŝi estis emerita juristino, eĉ monda vojaĝanto, konata Esperanta instruistino. Ŝi instruis per rekta metodo. Eble ne ĝuste laŭ la reguloj de Haga Instituto, laŭ Marĉeka lernolibro, Zagreba metodo – ŝi kompilis ĉiujn tiujn manierojn de lernado kaj faris propran metodon, miksaĵon de ĉiuj, esplorita en praktiko en dudeko da landoj en kiuj homoj parolas pli ol dudeko da lingvoj. Interese estas, laŭ reagoj de instruataj homoj – ĉiam sukcese. Okazadis tiuj ŝiaj instruhoroj en tre diversaj lokoj, en modernaj lernejoj, en skoltaj tendaroj, en kabanoj, en klerigaj centroj, inter infanoj, iranaj virinoj, afganaj rifuĝintinoj, malriĉaj burundaj knaboj, inter hungaroj, serboj, rusoj, turkoj, bosnianoj, brazilanoj, novzelandanoj – mi ne povus nombri ĉiujn kiuj estis ŝiaj gelernantoj kaj kiuj estis ŝiaj geamikoj.

Ŝi naskiĝis en Subotica la 11-an de aprilo 1930. Ŝi esperantiĝis en la jaro 1985. En Esperanto Instituto en Hago Nederlando, ŝi akiris Cseh-metodan instruistan diplomon, estis D kaj FD por Cseh-metodo de UEA. Ŝi laboris kaj estis emerita kiel juristino, sed ankaŭ finis Pedagogian Akademion. Ekde 1996 ŝi estis vicprezidanto de Beograda Fervojista Esperanto-Asocio. Ŝi ĉeestis Universalajn Kongresojn 10-foje, ILEI-porinstruistajn kongresojn 7-foje, SAT-kongresojn

9 fojojn, IFEF-kongresojn 12-foje... En multaj kongresoj ŝi prelegis kaj gvidis kursojn. Kursojn komence ŝi laboris laŭ Zagreba metodo, poste laŭ Csehmetodo kaj foje laŭ Gerda Malaperis. Eksterlande ŝi gvidis kursojn en Hungarujo, Germanujo, Francujo, Nederlando, Italujo, Brazilo, Pollando, Aŭstralio, Nov-Zelando, Ukraino, Turkujo, Japanujo... pli ol 130 diversajn kursojn de diversaj niveloj. Entute ŝi vizitis 54 landojn (en ĉiuj kontinentoj) ĉiam faranta ion por Esperanto.

Ŝi okupiĝis ankaŭ pri eldonado. Ŝi aperigis propran tradukon al Esperanto de libro de Tibor Sekelj "Temuĝin la filo de la Stepo" (1993), la libron de Branimir Sĉepanović "Buŝo plena je tero", (1994) kiun elserbigis Antonije Sekelj, verkis librojn: "Esperanto – Lingvo de Paco en Irano" pri la realigita projekto de UEA, "Esperanto – Lingvo de Paco en Burundo-Afriko" (eldonis en 2005 proprakoste), le pri lo (2012).

Plurfoje ŝi korektis tekstojn de E-tradukantoj, ankaŭ helpetis iom en Nova PIV kiun eldonis SAT en la jaro 2003. En 2005 ŝi estis la redaktoro de poem-kolekto "Miozoto" de MargaretheGreta Stoll. Ŝi estis ano de Pasporta Servo, gastigis multajn amikojn el Koreio, Japanujo, Rusujo, Turkujo, Hungarujo, Rumanujo, Italujo, Bulgarujo, Germanujo, Pollando, Francujo, Australio, Nov-Zelando, Ĉinio ktp. En 2008 ŝi tradukis al la serba la lernolibron per rekta metodo kiun verkis Stano Marĉek.

Ŝi kredis ke Esperanto estas tre grava rimedo por pli bona kompreno inter homoj. Lastajn tridek jarojn de sia vivo ŝi dediĉis al sukcesa aplikado de tiu ideo en la praktiko. La Esperanto-movado per ŝia foriro perdis multon. Ripozu en paco, kara nia kamaradino!

DIMITRI JE JANIČIĆ

Fonto: Sennaciulo, 2016 majo-junio

Ĉokoladosalamo

Ingrediencoj:

300 gramoj da biskvitoj
150 gramoj da butero
100 gramoj da sukero
200 gramoj da fandoĉokolado
2 ovoj
2 kuleroj da rumo



Ni lasu la buteron ekster fridujo por moligi ĝin kaj dum ni dispecetigu la biskvitojn en granda bovlo. Ni fandu la fandoĉokoladon en maribano kaj ni kirlu ĝis ĝi iĝas kremaspekta kaj sen grumeloj kaj ni lasu ĝin malvarmiĝi.

Kiam la butero estos morbida, ni laboru kun spatelo, kaj ni aldonu la sukeron, la ovojn, la fandoĉokoladon,

kaj la rumon.

Ni amalgamu la miksaĵon bone kaj ni verŝu en la bovlo kun la biskvitoj, kaj miksu bone. Ni metu la kunmetaĵon en fornopapero kaj ni donu la formon kiun ni preferas kaj ni metu en la fridujo por 2-3 horoj. Ni tranĉu kaj servu tiun delikataĵon!
Bonan apetiton!



Fonto:

<https://kuirukunmi.com/2015/01/23/cokoladosalamo/>

Vortareto

amalgami	bir araya getirmek	fandoĉokolado	eritme ĉokolatası	malvarmiĝi	soğumak
biskvito	bisküvi	fornopapero	fırın kağıdı	maribano	ben mari
bovlo	bol, kase	fridujo	buzdolabı	miksaĵo	karişım
butero	tereyaĝı	gramo	gram	moligi	yumuşatmak
ĉokoladosalamo	çikoltalı salam, mozzaik pasta	grumelo	pütür	morbida	hastalıklı
delikataĵo	lezzetli şey	iĝi	olmak	ovo	yumurta
dispecetigu	parçalara ayırmak	ingredienco	muhteviyat	rumo	rom
ekster	dışında	kirli	kariştırmak	spatelo	spatula
fandi	eritmek	kremaspekta	krem görünümlü	sukero	şeker
		kunmetaĵon	bileşim	tranĉi	kesmek
		lasi	brakmak	verŝi	dökmek

El la libro de "Dao De Jing" verkita de Ĉina filozofo Laocio la fondinto de taoizmo

Laozi

Lao Zi (Ĉince okunuŝo Laotsı; kimi kaynaklarda adı Lao Tsu, Lao Tse, Laotze veya Laozi olarak da geçer. Lao Ĉince 'yaŝlı', Zi ise 'üstad', 'bilge' anlamına gelir. Taoizmin kurucusu kabul edilen önemli bir Ĉin filozofudur. Dao De Ĉing kitabının yazarıdır.



Okulu ve Savaŝan Beylikler Dönemi olan MÖ 4. yüzyılda yaŝamıŝ olabileceğini söylerler. Ancak, önemli takipçilerinden Ĉuang Zi'nin MÖ 4. yüzyılda yaŝadığı düşünülürse bu görüşün temelleri zayıflamaktadır.

Bir rivayete göre Ĉou Hanedanlığının imparatorluk kütüphanesinde arşivciydi; 80 yaŝına geldiğinde insanların doğal güzelliklerin ve doğanın yolundan gitmemesinden yorulmuş ve üzölmüş olarak Ĉin'i terk etti. Hangu sınır kapısından geçerken muhafız Yin Ŝi, Laozi'dan gitmeden önce öğretilerini kaleme almasını istedi ve o da Dao Te Ĉing kitabında görüşlerini derledi.

Laozi, Ĉin tarihi belgelerine göre milattan önce 6. yüzyılda Ĉuu Devletinin Kuu ilinde (Kü Xiàn), yani günümüzdeki Henan eyaletinin Lüyü kasabasında doğmuştur. Bir başka görüş ise, Ĉin'in Yüz Düşünce

Bazılarına göre ise Laozi Ĉin'in efsanevi Sarı İmparatoru Huang-di'ydi. Başka bir görüşe göre ise Dao De Ĉing hepsi de Laozi takma ismini kullanan farklı yazarın kaleme aldığı metinlerden oluşur. Halk

geleneklerine dayanan tüm öğretilerde olduğu gibi Dao De Çing kendinden önce zaten var olan görüşlerin Laozi tarafından bir araya getirilmiş, derlenip düzenlenmiştir. Çok daha eskiye dayanan Yi Çing kitabında ya da yine bölgenin göçer halde yaşayan Şaman/Kam geleneğindeki toplumlarda da var olan çok benzer bu görüşler, bu bilgilerin Doğu Asya halklarının evren ve yaşam hakkındaki gözlem, gelenek ve görüşlerinin derlenmiş hali olduğunu ileri sürenler de vardır.

Laozi'nin ister kendi görüşleri ister derleme görüşleri olsun bunları kaleme alıp bir klasik eser olarak dünya halklarına sunması, halkların kendi tarihi öğretilerinin ne kadar günümüzün kuantum fizik bilimiyle örtüştüğünü görebilme olanağı sağlaması açısından onu hem kendi zamanında hem günümüzde çok önemli bir üstad yapmıştır.

Dao De Çing kitabına göre Hiçlikten Dao doğdu; Dao da Yin ve Yang kopuşamaz karşıt kutuplarını doğurdu. Böylece sonsuz ve döngüsel hareket ve değişim de başlamış oldu. Böylece evren veya "Gök ve Yer" diye bilinen her şey oluştu. Çin Tıbbı'nın yanı sıra birçok

kadim bilimsel çalışmaya rehberlik etmiş, geliştirip dönüştürmüştür.

Kaynak: <https://tr.wikipedia.org/wiki/Laozi>

Size Esperanto'ya tercüme edilmiş aşağıdaki kitaptan LaoZi nin veya bizim bildiğimiz şekli ile Lao Çe 'nin öğretilerinden derlemeler aktaracağız.

**Laocio
Dao De Jing
la Rikardo Vilhelmo**



Aŭtoro	Laocio
Titolo	Dao De Jing
Tradukis	Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser kaj Frank Vohla laŭ la germana traduko de Rikardo Vilhelmo: „TAO TE KING“
Eldonis	Klubo Karapaco
Korektis	Annieespera el Ĉinio
Aranĝis	Frank Vohla Hans-Georg Kaiser
Lasta redakto	28.06.2016

UNUA PARTO - TAŬO

01



TAŬO, kiu estas elparolebla, ne estas la eterna TAŬO. La nomo, kiu nomeblas, estas ne la eterna nomo. „Neestado“ estas la komenco de Ĉielo kaj de Tero „Estado“ estas la patrino de la unuopaj aĵoj. Tial la direkto al la neestado kondukas al la rigardado de la mirinda estaĵo, la direkto al la estado, al la rigardado de la spacaj limigitecoj. Ambaŭ estas samaj laŭ la origino kaj diversaj nur rilate la nomon. Kiel unuecon oni nomas ĝin sekreto. La eĉ pli profunda sekreto de la sekreto estas la pordo, tra kiu aperas ĉiuj mirakloj.

02

Se surtere ĉiuj ekkonas la belan kiel belon, tiam per tio jam estas metita la malbelo. Kiam surtere ĉiuj ekkonas la bonan kiel bonon, tiam per tio jam estas metita la nebono. Estado kaj neestado reciproke estigas sin. Malfacilo kaj facilo kompletigas sin reciproke. Longo kaj mallongo formas sin reciproke. Alto kaj malalto interkomunikas. Voĉo kaj sono estas geo. Antaŭe kaj poste sekvas unu la alian.

Tiel ankaŭ pri la saĝulo:
Li restadas en efikeco sen agado.
Li instruadas sen parolo.
Ĉiuj estaĵoj aperas,
kaj li ne rifuzas ilin.
Li estigas kaj ne posedas.
Li efikas kaj ne retenas.
Kiam la verko estas plenumita,
li ne restados ĉe ĝi.
Kaj ĝuste tial, ĉar li ne restadas,
li restas neforlasita.

(01) Rimarkoj de Cezar

La aŭtoro Laocio, nomata ankaŭ Laŭzi, la oldulo, kies strebado, kiel diris ĉina historiisto pri li, estis kaŝi sin kaj resti sen nomo, naskiĝis fine de la sepa jarcento antaŭ Kristo. La unua alineo estas la teoria bazo de la tuta verko. Pensu ekz. pri la kontraŭdiroj spirito kaj materio, ĉielo kaj tero, penso kaj estado ĉe Spinoza, fineco kaj senfineco, aŭ la Jin-Jang'-simbolon, kiu rgis por tio, ke mia traduko povis fariĝi pli bointerplektas pozitivan kaj negativan. Kaj fine, por pli bona kompreno, imagu la sekreton de la sekreto kiel cirklon, en kiu ankoraŭ nenio estas disigita, tiel kiel en la praa komenco.

Kiam mi komencis traduki, mi ne sciis, ke ĉino jam antaŭ mi tradukis la tekston en Esperanton. Don Harlow atentigis min pri tio, kaj tiel zone ol sen tiu komparteksto. Laŭ mia impresio tiu traduko de Wang Chongfang estas tre fidinda. Li konscie rezignas pri la provo brili kiel lingva artisto kaj penas precize redoni la enhavon. Mi tradukis la faman germanan tradukon de Rikardo Vilhelmo, Eugen Diederichs eldonejo Munkeno. Tiu parte ne tre fidinda traduko estas ankaŭ rilate la lingvon artaĵo. Do, kara leganto, se vi legas mian tradukon por ĝui la lingvon, uzu samtempe la pli sobran tradukon de Wang Chongfang, kaj tiel vi, kiel esperantisto havos du tekstojn, kiuj helpas al vi ensentiĝi en la verkon de granda filozofo, kiu estis por mi la plej interesa el ĉiuj, kiuj ekzistis ĝis nun. Interrete la traduko de Wang Chongfang momente ne troveblas. Sed ĝi mendeblas en retbutikoj. Ekzemplpe :

<http://www.esperanto-buchversand.de/LauxziLaotse--DaodeJing---L2736---?PHPSESSID=t0m05bkuigf84ermeeobh850t3>

Ta/o 0 La nedifinebla, nepersona principo, imanenta en la universo k ĝin movanta, karakterizata de la alterno de jino k jango. (PIV)

Por tiu ĉi termino s-ro Wang Chongfang uzas la formon „Taŭo“, ĉar li opinias, ke tiu pli taŭgas.

Jen lia opinio pri la vorto: „Mi preferas la formon „Taŭo“ al „Tao“, kvankam la dua estas akceptita de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, ĉar la unua formo estas fonetike pli proksima al la ĉina vorto „dao“. Se mi prenis la formon ‚Tao‘, laŭ la Esperanta gramatiko ĝia radiko devus esti ‚Ta-‘ kaj ‚-o“ estus ĝia finaĵo, tio evidente ne estus preferinda“.

(02) Rimarkoj de Cezar

La saĝulo, do la sanktulo, la profeto, tiu, kiu scias kaj kiu kapablas ĝuste agi aŭ ne agi.

La instruon de la „efikado sen agado“ oni komprenu en tiu senco, ke oni lasu efiki la kreajn fortojn mem, sen enmiksiĝi de ekstere. Tio kompreneble ne estas invito al pigrumado, sed por agi sen detruo, sen interrompi aŭ fuŝe ŝanĝi ion, do, sen enmiksiĝi en tion, kio bone iras per si mem. Tio estas tre grava penso de Laocio.

Ŝercoj



EN FRENEZULEJO

Psikiatro envenas frenezulejon por la ĉiutaga vizito al pacientoj, kaj trovas viron sidantan sur sofo, en ĉambro. De plafona trabo pendas

alia viro, tute senmova. La doktoro demandas:

- Kial li pendas de la plafono?
- Li pensas, ke li estas lampo.
- Kaj kial vi ne forprenas lin de tie?
- Ĉu vi sugestas, ke mi sidu en mallumo?!

SEN DEMANDOJ

Virino envenas la konsultejon, eksidas kaj longan tempon rigardas la doktoron, silente. Post iom da tempo, li demandas:

— Do, kion vi sentas?

La virino malbonhumore respondas:

— Vi devas scii. Ĉu ne vi estas la kuracisto?

La kuracisto mallevas la kapon kaj skribas ion sur papero. Kaj li diras:

— Iru al ĉi tiu doktoro, li solvos vian problemon. Li estas fakulo, kiu diagnozas sen interparolo.

— Kiu estas lia fako?

— Li estas bestkuracisto.

MALFACILA KURACILO

Paciento ricevis recepton post la konsulto. La doktoro diris:

— Prenu ĉi tiun medikamenton, kaj vi fartos pli bone.

Post kelkaj tagoj, li revenis, ĉar la malsano tute ne cedis. La kuracisto demandis:

— Ĉu vi zorge englutis la medikamenton?

— Neeble, doktoro! Sur la skatoleto troviĝas averto: „Konservu ĉi tiun skatolon fermita“.



Kurcvort-enigmo



Horizontale

1. Antaŭkaresma tempo, dediĉata al amuzaĵoj;
2. Numeralo esprimanta la nombrojn post 0; Havanta la sekson de ino;
3. Nur malmulte; Maniero kiel per la verkoj de la homo esprimiĝas lia percepto de la belo;
4. Partikulo, montranta neplenan atingon aŭ nesufiĉecon;
5. Streĉa interplektaĵo, per kiu interligiĝas du fadenoj; Verko, ĝenerale nelonga, ofte asimilita al esploro aŭ monografio, sed malpli sistema kaj pli libere esprimanta la pensojn de la aŭtoro;
6. Rilata al roko; Pezo de ĉia entenantaĵo (kesto, sako, botelo ktp), en kiu estas enpakita ia varo aŭ kemiaĵo;
7. La deksepa grafemo de la Esperanta alfabeto;
8. Tre forta emo al io; Serozo, kiu tegas la internon de la torako kaj la eksteron de la pulmoj;
9. La nomo de la imperio starigita de Aŭgusto en 27 a.K.; Regula interaranĝo, kaj pli precize la maniero, en kiu la objektoj sekvas unu la alian;
10. De senvostaj vertebruloj el la klaso de amfibioj, ordo de anuroj, similaj al bufo, sed kun longaj postaj kruroj, senveruka haŭto kaj kun dentoj.

Vertikale

1. Prepari nutraĵon, elmetante ĝin al varmego, ĝis ĝi fariĝas manĝebla aŭ trinkebla; Vasta etendaĵo da sala akvo, kiu kovras la plej grandan parton de la terglobo;
2. Membro de grupo, de societo ktp.; Ĉefurbo, en la antikveco, de la Imperio, en la nuntempo, de Italio;
3. Ano de la ĉefa gento de Rumanio; Unuo de elektra rezistanco en la internacia sistemo de mezurunuoj;
4. Komenco de jararo, prezentanta aparte gravan navigaĵon en la historio, la vivo, la scienco ks.;
5. Tia, ke oni estas tedata; Prepozicio esprimanta ĝenerale la celon kaj pli precize montranta tion, kies efektivigo aŭ akiro estas celata;
6. Ĉefurbo de Aŭstrio;
7. Sufikso signifanta membron de grupo; Partikulo, signifanta «en alta grado»;
8. Silabo, kiu montras en la absoluta solfeĝo la absolutan tonon A;
9. Malĝusta opinio, konduto aŭ faro;
10. Ronda, kontrahebla, diverskolora membrano en la okulglobo, kun centra truo, la pupilo, por enlasi la lumradiojn; Konsistanta el pli-malpli pura oro;
12. Malvasta kaverno; Estanta en pli ol sufiĉa kvanto aŭ grado, superanta la ĝustan mezuron;

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												

La solvo de la krucvort-enigmo troviĝas en la lasta paĝo

Poemo

Al la semanto

de Antoni GRABOWSKI

Feliĉa la semanto estas,
Printempe kiu semis grenon
Kaj en aŭtuno ĝoje festas
De bonrikolto la solenon.

Feliĉa, kiu en la koro
Pri granda verko flame revis,
Kaj el la ĉarma revo-floro
Maturan frukton elricevis.

Arbeto kiun, Majstro kara,
Vi plantis ĉe Vistul-rivero,
Elkreskis ĝis lazuro klara,
Etendas branĉojn ĉirkaŭ tero.

Sub ĝi kolektis tero-filojn
La jubile' de nova sento,
Per kiu frate ligas milojn
Neŭtrala lingva fundamento.

Krakovaj muroj ĝoje sonas,
Dum lernantaro multnacia
Dankeme sian Majstron kronas
Per la verdaĵo laŭrfolia.

En niaj koroj, granda homo,
Stariĝas viaj monumentoj;
La gloron de l' benata nomo
Ripetos ĉiuj la jarcentoj!



Antoni Grabowski estis pola kemiisto-inĝeniero de prusa ŝtataneco kaj frua Esperanto-aktivulo, kiu precipe per siaj tradukoj grave influis la evoluon de la Esperanta literatura lingvo.

Al la vespera stelo

de Richard WAGNER

elgermanigis Antoni GRABOWSKI
el "Tannhäuser"

Funebre kovras la krespusko valon,
Etendis nokto nigran la vualon.
Deziras supren flugi la anim',
Sed tenas ĝin de nokt-teruroj tim'.

Aperas jen, vi stelo la plej kara!
De malproksimo fluas lumo klara,
Disigas ombrojn ĉarma la radi',
Amike montras la vojon al mi.

Ravite, ho vespera stel',
Mi vin salutas sur ĉiel';
Kaj de fidela mia kor'
Salutu ŝin en tiu hor',
Kiame flugos ŝi de l' tero,
Al anĝelar' en supra sfero.

Fonto: <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/>

La Junaj Detektivoj - Ĉapitro 3

Mez-Nivela



Pasis tuta semajno dum kiu nenio okazis. Tiam unu nokton, Andreo subite vekiĝis. Estis iu en la ĉambro.

"Kiu estas tie?" li demandis.

"Ŝ-ŝ-ŝ," venis flustra respondo. "Estas mi, Lizbeta. Aŭskultu! Mi aŭdis ion malsupre."

Ili ambaŭ aŭskultis. Malsupre en la manĝoĉambro ili aŭdis voĉojn. Estis la geonkloj, kiuj parolis mallaŭte unu al la alia. La ĝemeloj ne povis aŭdi la vortojn, sed ili estis certaj, ke oni parolas. Tiam ili aŭdis alian brueton, kiun ili ambaŭ rekonis; ĝi estis la grincio de la kelopordo.

Ili iris silente al la pordo de la dormĉambro por pli bone aŭdi, kaj klare aŭdis paŝojn, kiuj malsupreniris laŝtonan ŝtuparon de la kelo. Post kelkaj momentoj la paŝoj revenis, kaj ili aŭdis, ke la pordo fermiĝis.

"Li metis la pakaĵon en la kelon," flustris Lizbeta. "Kaj nun mi devas reiri rapide al mia ĉambro. Eble ili venos supren, kaj mi ne volas, ke ili kaptu min."

Kaj ŝi kuris silente el la ĉambro. Post kvin minutoj Andreo aŭdis paŝojn sur la ŝtuparo, kaj tra la duone malfermita pordo li vidis la lumon de kandelo. La geonkloj venis al la lito. La paŝoj preterpasis la pordon de Andreo, kaj iris al la dormĉambro de onklo Konrado kaj onklino Maria. Tiam ilia pordo fermiĝis, kaj ĉio estis silenta.

Dum longa tempo Andreo pensis kaj repensis pri la mistera afero. Kial la onklo ĉiam metas la pakaĵon en la kelon dum la nokto? Kaj kion ĝi enhavas, kaj de kie ĝi venas? Andreo rigardis la horloĝon per la lumo de la luno kaj vidis, ke estas la dua horo matene. Finfine li ekdormis kaj sciis nenion plu ĝis la mateno.

Post la matenmanĝo, kiam la farmisto jam iris al la kampoj, la gefratoj vestis sin por eliri. Onklino Maria forportis la manĝilojn por lavi ilin, kaj subite Andreo faris demandon.

"Onklino, kiu estas tiu viro, kiu ofte venas en aŭtomobilo kaj forportas pakaĵon?"

La onklino eksaltis kvazaŭ en surprizo, kaj fikse rigardis la knabon.

"Li estas komerca amiko de via onklo," ŝi respondis. "Kial vi demandas?"

"Mi nur pensis pri li," diris Andreo, "ĉar li venas tiel ofte. La alian produktaĵon de la farmbieno onklo Konrado kutime forportas en la farmvagono. Kion la onklo vendas al li?"

La vizaĝo de onklino Maria iĝis tre severa.

"Estas tre malĝentile fari tiom da demandoj pri la aferoj de via onklo," ŝi respondis. "Ĝi tute ne koncernas vin. Eliru kaj ludu." Kaj ŝi forportis la manĝilojn al la kuirejo.

Andreo kaj Lizbeta eliris kaj promenis laŭ la vojo al la vilaĝo.

"Hodiaŭ," diris Lizbeta dum ili marŝis, "la aŭtomobilo venos. Vi vidos."

Kaj fakte post nelonge ili vidis la veturilon, kiu venis laŭ la vojeto al la farmdomo. La veturigisto mansalutis ilin kiam li pasis ilin, kaj ili daŭrigis la promenon al la vilaĝo.

Kiam ili alvenis en la vilaĝon ili haltis ĉe la ĉefvojo kaj atendis. Ili deziris vidi, en kiun direkton la aŭtomobilo iros. Dekstre la vojo kondukis al la malgranda stacidomo, kaj maldekstre al la malproksima ĉefurbo.

Apud la loko, al kiu ili alvenis, estis la vilaĝa butikio. Ĝi estis la sola butikio en la malgranda vilaĝo, kaj s-ino Ŝmit, la butikistino, vendis preskaŭ ĉion. Lizbeta rigardis la montrofenestron kun intereso, kaj dum ili rigardis, la pordo malfermiĝis kaj s-ino Ŝmit mem aperis. Ŝi estis ronda, bonhumora virino kun la ruĝaj vangoj de kamparano.

La ĝemeloj konsentis, kaj ili komencis interparoli kun la bona butikistino. Sed ili ne forgesis la aŭtomobilon, kaj kiam ĝi revenis, ili rigardis ĝin kaj vidis, ke ĝi turniĝis maldekstren. Ĝi preterpasis la butikon kaj foriris.

"Tiu viro ne apartenas al la vilaĝo," diris s-ino Ŝmit. "Li vizitis vian onklon, ĉu ne?"

"Jes," respondis Lizbeta. "Li estas amiko de onklo

Konrado." Kaj ŝi ne diris plu pri li. Post kelkaj minutoj la gefratoj adiaŭis la butikistinon, kaj ekpromenis al la farmbieno.

"Estas strange," diris la knabino, dum ili marŝis, "ke tiu viro venas tian longan distancon por preni la pakaĵon. Certe estus pli facile sendi ĝin per vagonaro."

"Sed tio nur montras pli klare," respondis ŝia frato, "ke la afero estas sekreta. Se la pakaĵo enhavas kontrabandaĵon, oni ne volos sendi ĝin per la fervojo, ĉar eble la polico trovos ĝin."

Dum iom da tempo ili marŝis silente, sed ambaŭ pensis pri la misteraj pakaĵoj.

"Ĉu vi rimarkis," fine demandis Andreo, "je kioma horo ni aŭdis tiun aferon la pasintan nokton?"

"Ne," respondis Lizbeta. "Mi ne pensis pri la horo."

Andreo frapis la bruston fiere.

"Ha!" li kriis. "Tio bezonas veran detektivon! Oni devas observi ĉion. Nu, mi mem ne forgesis tion. Mi rigardis la horloĝon, kaj estis la dua horo."

Lizbeta ne memorigis lin, ke estis ŝi, kiu unue rimarkis la pakaĵon, nek ke estis ŝi, kiu aŭdis la voĉojn dum la nokto.

"Sed tio ne helpas," ŝi respondis. "Ni devas eltrovi de kie oni portas la pakajojn, kaj kiu portas ĝin. Je la dua horo ĝi jam estis en la domo."

"Malsaĝulino!" diris Andreo. "Se ni scias, ke la pakaĵo estas jam en la domo antaŭ la dua, estas evidente, ke ĝi venas pli frue ol tio. Do, ni devas nur resti sendormaj, kaj ni vidos de kie ĝi venas."

"Ĉiun nokton?" demandis la knabino. "Ĉar ni tute ne scias, je kiu nokto ĝi alvenos. Vi povas resti sendorma ĉiun nokton se vi volas, sed mi ne. Mi bezonas mian dormon."

Kaj Andreo devis konsenti, ke eĉ li devas dormi, kaj ne povas resti sen dormo dum eble pli ol unu semajno. La detektivo laboro alvenis al barilo, kaj ili ne sciis, kiel preterpasi ĝin.

Sed post tri tagoj okazis io, kio donis al ili la scion, kiun ili deziris.

(daŭrigota)



La rezulto de la referendumo pri EU en Britio entuziasmigis iujn esperantistojn, kiuj vidis en ĝi ŝancon por Esperanto. La eventuala eliro de

Britio tamen nenion ŝanĝos en la lingva reĝimo de la EU-instancoj.

La rezulto de la referendumo pri la membreco de Britio en Eŭropa Unio estis surpriza kaj eĉ ŝoka por multaj britoj: 52 procentoj el la partoprenintoj subtenis la eliron el la Unio. Surprizitaj estis ankaŭ la plej multaj britiaj politikistoj, kaj ne tuj klaras, kiuj estos la sekvaj paŝoj.

Laŭ Brian Moon, brito kaj multjara tradukisto ĉe Eŭropa Unio en Luksemburgio, same ne klaras, kion la eliro de Britio el la Unio signifos por la estonteco de EU kaj internaciaj kontaktoj en Eŭropo, ja tre gravaj por la esperantistoj.

– Malfacilas tion antaŭvidi, ĉar “eliro” de Britio ne estas klare difinita: nun venos dujara periodo dum kiu necesos precizigi la estontajn rilatojn inter Britio kaj EU. Oni memoru, ke la rezulto de la referendumo ne signifas, ke de unu tago al alia Britio ĉesas esti membro de EU.

Preskaŭ ĉiuj britaj esperantistoj, kiuj publike esprimis sian opinion dum la referenduma kampanjado, preferis ke Britio restu en Eŭropa Unio, kaj tre malentuziasmis pri la rezulto. Tamen ekster Britio ne malfacilas trovi esperantistojn, kiuj kontentas pri la rezulto kaj esperas ke ĝi kondukos al marĝeniĝo de la angla lingvo en Eŭropa Unio kaj donos novan ŝancon al Esperanto.

– Por ni esperantistoj tiu estas unu el la ŝlosilaj momentoj kiujn ni ne rajtas maltrafi: estas la momento por nin reproponi, laŭte kaj tuje, estas la momento por kunveni kaj decidi politikan agadon en ĉiuj anguloj de Eŭropo (almenaŭ en ĉiuj Eŭropaj anguloj de Eŭropo) kaj, eventuale ankaŭ agente de ĝia ekstero. Estas nia vico, la angla lingvo retiriĝu kun siaj parolantoj en sia bela sed nun ankoraŭ pli malluma insulo, skribis la itala esperantisto Brunetto Casini en Facebook.

– Kiel multe el ni Esperantistoj, mi estis ŝokita ĉi-

matene ekscii, ke la Britoj voĉdonis favore al ekŝiĝo de la Eŭropa Unio. Kvankam, mi pensas, tio estas tre malbona novaĵo por Eŭropo kaj por la tuta mondo, la ekŝiĝo de Britio povas aldoni al Esperanto novan, strategian elanon. Nun estas bona momento por ĉiaj asocioj, kaj ĉiuj entreprenemaj Esperantistoj, pripensi kiel tiu ŝanĝo povas agi tre apoge kaj favore al io, kion kelkaj Esperantistoj nomas Fina Venko, skribis Dennis Keefe en komento en Libera Folio.

Laŭ Brian Moon, kiu bone konas la lingvan ĝangalon de Eŭropa Unio, la eliro de Britio tamen neniel influos la lingvan reĝimon de la EU-instancoj. La oficiala statuso de la angla ne ŝanĝiĝos, ĉar krom en Britio, la angla estas oficiala lingvo ankaŭ en du aliaj landoj de la unio: Irlando kaj Malto. Eĉ malpli la eliro de Britio povas influ la neoficialan rolon de la angla.

– La efektiva rolo de la angla tre diferencas de ĝia oficiala pozicio: formale la angla estas nur unu inter egalrajtaj oficialaj lingvoj, sed praktike ĝi estas ne nur prima inter pares [Latine: la unua inter egaluloj], sed la superreganta lingvo, tio estas en multaj cirkonstancoj la sola uzata, rakontas Brian Moon.

Sian oficialan rolon en EU la angla ekhavis en 1973, kiam Britio kaj Irlando aliĝis al la tiama Eŭropa Komunumo. Dum multaj jaroj la franca en la praktiko estis la ĉefa lingvo de la EU-burokratio, sed tio ŝanĝiĝis kun la aliĝo de Aŭstrio, Finnlando kaj Svedio en la 1990-aj jaroj kaj poste de pliaj naŭ landoj de centra kaj orienta Eŭropo post la jarmilŝanĝo. En 2004 aliĝis al EU ankaŭ Malto, kie la angla estas unu el la du oficialaj lingvoj, kaj Kipro, kie la angla estas ofte uzata.

En majoritato el la novaj landoj la scioj de la angla lingvo estis multe pli oftaj ol tiuj de la franca, kaj post la plilarĝiĝo de la Unio la angla rapide iĝis superrega en la interna funkciado de multaj EU-instancoj. Ĉar nek la oficiala nek la neoficiala roloj de la angla en la instancoj de Eŭropa Unio rekte dependas de la membreco de Britio, la esperoj pri nova printempo por Esperanto ligo kun la antaŭvidebla eliro de Britio el la Unio ŝajnas senbazaj.

Fonto: <http://www.liberafolio.org/2016/brita-eksigo-el-eu-ne-helpas-esperanton>



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun Sankta Aŭgusteno.

Vasil Kadifeli

Sankta Aŭgusteno

Sankta Aŭgusteno (354-420 PK) kiel kristano kaj kredanto je Dio volis scii pli pri la vero. Sed religio ne provizis lin kun ĉiuj da respondoj. Li demandis kaj verkis pri tiom da aferoj, ke li, kiel kristano, riskis sian postmortan vivon eble bruligante ĉe infero. Unu el la plej gravaj demandoj de li estis kial Dio permesas malbonon ekzisti sur la tero.

La eklezio en la mezepoko baziĝis sian filozofion sur la principoj de grekaj filozofoj Platono kaj Aristotelo. Tiun filozofion la eklezio strikte kaj forte kunligis kun la religio. Tamen estis aliaj ne kristanaj filozofoj kiuj pli libere interpretis iliajn principojn, ekzemple la juda Maimonido kaj islama Ibn Sina. Aŭgusteno, kiun poste la eklezio nomis sanktulo, ankaŭ estis unu el la plej gravaj de tiuj filozofoj de la mezepoko.

Li naskiĝis en Tagaste urbo en Alĝerio. Lia patrino estis kristano kaj lia patro apartenis al unu el la lokaj religioj en Alĝerio. Post freneza juneco kaj ekhavo de unu infano pro rilato kun iu publikulino, en siaj tridekaj jaroj li fariĝis kristano, kaj eĉ pastro. Li estis fama pro lia preĝo je Dio por forpreni siajn seksajn instiktojn sed ne tuj ĉar li ja ĝojis tiujn impulsojn. Li verkis preskaŭ cent librojn el kiuj "Konfesoj" kaj "Ŝtato de Dio" estas la tre famaj. En siaj verkoj li multe uzis la filozofion de Platono almetante kristanajn ecojn en ĝi.

Multaj kredantoj kredas je la absoluta povo de Dio sed ili devas akcepti ke estas multaj doloroj en la vivo, aŭ naturaj: malsanoj, tertremoj ktp. aŭ etikaj: malbonaĵoj faritaj de homoj, murdoj, torturoj ktp. Antaŭ multaj jaroj la greka filozo Epikuros (rigardu en antaŭaj numeroj de nia revueto) sciis tiun. Kial la absolut-pova Dio permesas tiajn dolorojn sur la tero? Se Dio ne povas haltigi tiujn dolorojn, Dio ne estas absolut-pova. Se Dio estas absolut-pova eble li ne volas haltigi tiujn dolorojn. Do, Dio ne povas esti bona.


Aŭgusteno koncentriĝis sur etikaj malbonaĵoj. Kaj li postulis respondon pri kial Dio ne haltigas malbonaĵojn

kaj dolorojn. Kia murdistokun tranĉilo en la mano estas preta mortigi homon ne estas haltigita per Dio. Dio ja scias ĉion kaj ankaŭ scias la intencon de la murdisto kaj scias kio okazos post kelkaj sekundoj. Se Dio estas bona tiam Dio certe ne volus, ke tiaj malbonaĵoj okazu. Plue se ĉio okazas laŭ la volo de Dio, tiam Dio certe volas, ke tiaj malbonaĵoj okazu.

Aŭgusteno en sia junaj jaroj trovis respondon en Maniĥeismo:

Mani eismo *Ĝ Doktrino, laŭ kiu Satano estas kuneterna kun Dio, k la mondhistorio estas la batalo inter la du ĉefprincipoj de bono k de malbono. -> dualismo. (PIV)*

Maniĥeistoj kredas, ke la bono elvenas de la sprito kaj la malbono de la korpo de homo. Por Maniĥeistoj malbonaĵoj ne estas grava problemo, ĉar laŭ ili Dio ne estas absolut-pova kaj Dio ne povas kontoli ĉion. Do, Dio ne rekte repondulecas pri la malbonaĵoj, kaj oni ne povas kulpigi Dion pri malsukceso malebligi la malbonaĵojn.



Sed en postaj jaroj Aŭgusteno forlasis la pensmanieron de Maniĥeismo. Li tute ne komprenis kial la batalo inter la bono kaj malbono devus daŭri ĝis-eterne. Kial Dio ne venkas? Kial Dio permesas la malbonon? Kial estas tiom da malbonaĵoj? Aŭgusteno multe pensis pri tio kaj finfine li trovis la solvon en tio, kion ni nomas "memvolo". Homoj memvole povas elekti kion ili faros en posta paŝo. Dio donis "memvolo"n al homoj.

Aŭgusteno fakte ŝatis "memvolo"n ĉar tiu ankaŭ estas kialo por esti bona kaj fari bonaĵojn. Tamen ĝi ankaŭ estas la kialo por esti malbona kaj fari malbonaĵojn. Ni ĉiam volas monon kaj propraĵojn, ni povas mensogi, ni povas malutili aliulojn, ni eĉ povas mortigi homojn. Tiel ni malproksimiĝas de Dio kaj la volo de Dio. Pro tio ni devas kontroli niajn pasiojn (tio montras ke Aŭgusteno kunhavis la pensmanieron de Platono). Homoj, kontraŭ bestoj, havas cerbon kaj ili devas uzi ĝin. Se ni estus programitaj por ĉiam elekti la bonon tiam ni ne uzus nian cerbon kaj ni ne havus "memvolon". Do havi

le preferon kion fari en posta paŝo estas bona afero kaj tiun donis Dio al homoj.

Pro tio ni ne povas diri, ke la absolute-pova Dio respondulecas pri la malbonaĵojn. La etikaj malbonaĵoj estas rezultoj de niaj preferoj. Kaj tio komencis frue per la elekto de Adamo kaj Evo manĝi la pomon dum ili estis en paradizo. Ili alportis "pekon" sur la mondon. Kaj ĉiuj de ni ankoraŭ pagas por tiu peko. La "unua

peko" rezultis al heredaĵo de peko. De Adamo kaj Evo, kaj de generacio al generacio, ĝis ni. Do, ni havas la potencon peki.

Per tiu rezonado Aŭgusteno akceptis, ke kvankam ekzistas malbonaĵoj en nia mondo, tamen Dio estas absolut-pova.

(Daŭrigota)

Monda Tago de Rifuĝintoj



Monda Tago de Rifuĝintoj: mesaĝo al Unuiĝintaj Nacioj de Universala Esperanto-Asocio

Gazetaraj Komunikoj de UEA
N-ro 619 (2016-06-20)

Monda Tago de Rifuĝintoj (20-a de junio) reprezentas specialan okazon por fari tion kion ni devas fari en ĉiu tago de la jaro, nome konsideri kaj mildigi la malfeliĉan staton de la tutmonde kreskanta nombro de rifuĝintoj – homoj forpelitaj el siaj hejmoj pro konflikto, kaj enplektitaj en armitaj disputoj ne de ili kreitaj. Kongrue kun nia ĉefa celo, nia organizaĵo, Universala Esperanto-Asocio, aparte interesiĝas pri klopodoj faciligi la lingvan situacion de tiuj rifuĝintoj.

Rifuĝintoj perdis pli ol siajn hejmojn kaj sian vivpanon: ili perdis ankaŭ la komunumojn kaj kulturojn, kiuj subtenas ilin. Ofte la lingvoj de tiuj komunumoj ne estas vaste parolataj en la lokoj, en kiuj ili nun troviĝas. En tiaj cirkonstancoj, ili despli malfacile kapablas klarigi sian situacion al aliaj, kompreni eĉ la simpatiajn reagojn de tiuj kiujn ili renkontas, kaj trakti kun la oficialaj funkciuloj kiuj ofte tenas en siaj manoj ilian estontecon.

Sekve ni forte petas al Unuiĝintaj Nacioj, ke la



organizaĵo faru ĉion eblan por certigi

1. Ke komunikado kun rifuĝintoj okazu en lingvoj, kiujn ili povas kompreni,
2. Ke la funkciuloj, kiuj traktas kun la rifuĝintoj ricevu trejnadon pri tiuj lingvoj,
3. Ke specialaj servoj estu starigitaj por aŭskulti kaj plusekvi la rakontojn kaj zorgojn de la rifuĝintoj en iliaj propraj lingvoj,
4. Ke edukaj servoj en taŭgaj lingvoj estu disponigataj al rifuĝintaj infanoj kies lernado estis interrompita kaj kies estonteco estas sekve endanĝerigata.

Komprenema atento al la lingvaj bezonoj de rifuĝintoj estas ne nur principa demando sed ankaŭ demando de bona praktiko.

Enskribita en la statuton de nia Asocio estas respekto por ĉies rajtoj tia kia ĝi estas esprimata en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiun ni konsideras "esenca kondiĉo por nia laboro." Socia justeco kaj lingva justeco iras manenmane. Ni devas memori nin pri tiu fakto en ĉiu tago de la jaro – sed speciale dum la Monda Tago de Rifuĝintoj.

101-a UK en Nitra, Slovakio - de la 23-a ĝis la 30-a de julio

Tio ĉi estas Ludoviko, Ludoviko estas esperantisto
Ludoviko ŝatas vojaĝi, amuziĝi, ekkoni novajn homojn
Tial Ludoviko aliĝis al UK! Estu kiel Ludoviko!





Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un

"Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi açıklamalarını bir kere veriyoruz,

sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("-") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni bileşik kelimeleri ayırıyoruz.

LA DORMO-ĈAMBRO

En la dormo-ĉambro estas kvin litoj.

La du grandaj litoj estas por la patro kaj la patrino.

La tri mal-grandaj litoj estas por la tri infanoj.

La musoj dormas dum la nokto.

Dum la tago ili ludas, kaj manĝas, kaj la infanoj lernas lecionojn.

Sed dum la nokto ili dormas en la litoj.

La katino kaj la katido ne havas dormo-ĉambron. Ili dormas ne dum la nokto, sed dum la tago, kaj tiam ili dormas sur la planko.

La suno brilas dum la tago, kaj la luno brilas dum la nokto.

Dum la tago estas varme, ĉar tiam la suno

brilas.

Sed dum la nokto estas mal-varme, ĉar la suno ne brilas dum la nokto.

"Panjo," demandas Johano, "kial estas mal-varme dum la nokto?"

"Ĉar la suno ne brilas dum la nokto, mia filo."

"Kial la suno ne brilas dum la nokto?"

"Ĉar la luno brilas dum la nokto, mia filo."

"Kial ne brilas la suno dum la nokto, kaj la luno dum la tago?"

"Ho, Johano, ne far-u tiom da demandoj," diras lia patrino.

"Ir-u lud-i en la ludo-ĉambro."

Infanoj nomas la patron "Paĉjo". Ili nomas la patrino "Panjo".

Yeni Kelimeler

demandas soruyor (demandi: fiilin mastar formu)

kial Neden?

lernas öğreniyor (lerni: fiilin mastar formu)

nomas adlandırıyor, isimlendiriyor (nomi: fiilin mastar formu)

Paĉjo

babacık (gibi sevimli bir form)

Panjo

annecik (gibi sevimli bir form)

por

için

Yeni Ekler

-u Fiiller için emir eki (ör. ne faru : yapma, manĝu:ye)

-ĉjo Bir erkek ismini sevimli hale getirmek için kullanılır (babacık, mısıık gibi)= "ismin ilk hecesi" + "ĉjo".
Örnek: Mustafa -> Muĉjo

-njo Bir kadın ismini sevimli hale getirmek için kullanılır (annecik, ayşecik gibi)= "ismin ilk hecesi" + "njo".
Örnek: Hanife -> Hanjo

Mondo-mapo pri esperantistoj

Lastatempe mi kreis la retejon <http://esperantujo.directory/> – ĝi estas simpla mondo-mapo de esperantistoj. Mi kreis ĝin por montri ke estas esperantistoj ĉie en la mondo, kaj ke Esperanto ja estas vivanta lingvo.

Do, bonvolu registriĝi, alŝuti foton pri vi, kaj ni plenigu ĝin kun amikaj vizaĝoj. Espereble ĝi helpos novajn esperantistojn trovi sin reciproke.

Martin Rue

[En la FB-grupo "Esperanto"]

Ndlr: La mapo povas esti impresa ilo por montri kaj pruvi la realan disvastiĝon de Esperanto-parolantoj. Por tio estas necese, ke registriĝu esperantistoj ankaŭ el malgrandaj, foraj kaj neeŭropaj landoj. Dankojn pro via eventuala helpo en tiu tereno. - L.S.

Fonto: Ret-Info, LS



45-a Internacia Infana-junula Kongreseto - temo «Bestoj»

23-a de julio ĝis 30-a de julio 2016 ĉe urbo Nitro, Slovakujo

paroli Esperanton.

La IJK (Internacia Infana-junula Kongreseto), okazos ĉe la slovakaj urbo Nitro, de la 23-a ĝis 30-a de julio 2016. Samtempe okazas la UK en Nitro.

Okazas ludoj, banado, ekskursoj, manlaboroj, sporto, Esperanto-kursoj; vespere bivakfajro, tabloludoj, diskoteko, laŭtleĝado, muziko, Lufhomoj...

<http://bertosch.free.fr/iik2016/>

La infankongreseta temo estas «Bestoj».

IJK ne estas komerca servo, sed sindediĉo de volontuloj. La gvidantoj estas gepatroj kaj e-istoj, kiuj ŝatas okupiĝi pri infanoj kaj provas krei ĝojan kaj E-lingvan etoson por la infanoj laŭ sia propra kapablo kaj sperto. Ĉia helpo via bonvenas.

La skipo konsistas el gvidantoj el diversaj landoj. Iuj gvidantoj partoprenis IJK-on jam plurfoje, aliaj venos unuafoje. Tiuj gvidantoj kutimas zorgi pri infanoj kiel instruisto, animanto aŭ gepatro.

La programo celas amuzi la infanojn kaj instigi ilin



Internacia Simpozio Denove en Vroclavo



Kadre de la kvintaga Interkultura Majrendevuo, la 5-an de majo 2016 en la Papa Teologia Fakultato en Vroclavo (Wrocław) okazis la 2a Internacia Simpozio titolita “Kiel sukcese instrui – didaktiko teorie kaj praktike”.

La simpozion por neesperantista publiko kaj esperantistoj interesiĝantaj pri la temo iniciatis kaj organizis la Centro de Interkultura Edukado – Vroclavo ĉifoje kun la pola ILEI sekcio kunlabore kun neesperantistaj organizaĵoj Vinci Fit Art-Radość Życia, Akademia Leonarda Da Vinci - Złoty Wiek, Stowarzyszenie TuRazem.

Kun granda ĝojo mi aldonas, ke la Simpozion patronis

Universala Esperanto Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Ĉe la komenco de la simpozio estis prezentita filmo pri efika lernado de la fremda lingvo preparita de Marlon Couto Ribeiro kaj Anikó Szalay. Profesorino Ilona Koutny (Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM) prezentis la prelegon pri instruado de vortoprovizio. Maria Pokrzywnicka (Etnografia Muzeo en Toruń) transdonis utilajn informojn kiumaniere kunlaboro kun muzeo helpas al instruistoj sukcese instrui. Grażyna Szubryczyńska (Infanĝardeno „Kangurek” en Toruń) priparolis kunlaboron de la toruna infanĝardeno „Kangurek” kun ĉina infanĝardeno Tian Mi kaj pruvis, ke infanoj de la toruna infanĝardeno belege adaptas ideojn de Esperanto. Dank’ al Halina Kuropatnicka-Salamon (Centro de Interkultura Edukado - Vroclavo) la publiko eksciis pri la rolo de individuigado dum la instruado de personoj en la tria aĝo - vidantoj kaj blinduloj. Doktorigantino pri interlingvistiko Małgorzata J. Komarnicka (Centro de Interkultura Edukado - Vroclavo) proksimigis al publiko brazilan eduksistemon. Magdalena Filcek kaj doktorino Ewa Aplaus (Vinci Fit Art- Radość Życia kaj Akademia Leonarda Da Vinci - Złoty Wiek) priparolis spegulan skribadon, kiel sinkronigi ambaŭ duonglobojn de la cerbo kaj la profitojn de spiradekzercoj. Doktorino Walentyna Wnuk (Pedagogia Universitato) prezentis holisman disvolviĝon de la homo. Barbara Despiney, dr hab. Université Paris 1 Panthéon-Sorbonne resumis ĉiujn prelegojn finante la simpozion.

Post la sukcesa aranĝo Ewa Rapacz kune kun neesperantistoj preparis artan programon kaj komunan vespermanĝon por la organizantoj, prelegantoj kaj gastoj.

La Internacia Simpozio plenumis gravan rolon. La partoprenantoj havis eblecon redukti streson kaj streĉiĝon kaj pliiĝis senton de harmonio, paco kaj ekvilibro.

La simpozio ankaŭ montris, ke eblas interŝanĝo de sciencaj konkludoj kaj organiza kunlaboro esperantistaj kaj neesperantistaj medioj por komuna efiko, nome la altnivela, eduka aranĝo. La organizantoj ricevis petojn prelegi pri Esperanto kaj instrui la lingvon.



Ni jam invitas partopreni en la sekva, la 3a Internacia Simpozio, kiu okazos en Vroclavo la 19an de majo 2017 dum la 2a Interkultura Majrendevuo.

Małgorzata J. Komarnicka
prezidanto de
Centro de Interkultura Edukado – Vroclavo

